

ESPERANTO

REVUO INTERNACIA

N-ro 620-1 (7-8)

Julio-Aŭg. 1957



**Universala
Esperanto-Asocio**

(En Konsultaj Rilatoj kun
U.N.E.S.C.O.)

Novaj Esperanto-Ĵoŝmarkoj



*Hungarujo ĵus eldonis du poŝtmarkojn honore al
Esperanto kaj D-ro Zamenhof (vidu p. 110).*



ESPERANTO

Julio-Aŭg. 1957

Revuo Internacia

N-ro 620-1 (7-8)

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio

(En Konsultaj Rilatoj kun U.N.E.S.C.O)

Fondinto: H. HODLER

* * *

Honora Redaktoro: HANS JAKOB

* * *

Ĉion por la redakcio oni sendu al la

Redaktoro: Mag. W. AULD

Knockfarril, Thornside Road, Johnstone, Renfrewshire, Skotlando.

* * *

Ĉion pri administrado de UEA kaj de la revuo ESPERANTO (abonado, reklamoj, anoncetoj) sendu al UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO, Eendrachtsweg 7, Rotterdam C, Nederlando. Telefono: Rotterdam 128313. Ĝirkonto: 378964.

* * *

Ĉiu materialo por difinita numero devas atingi respektive la redakcion aŭ la Centran Oficejon (vidu supre) antaŭ la 1-a de la antaŭa monato.

Bankisto de U.E.A.

R. Mees & Zoonen, Blaak 10, Rotterdam C.

Traduko kaj represo de artikoloj estas permesataj, kondiĉe ke oni citu la fonton. Oni sendu tian represaron al nia redakcio.

Jara abono (1957): 7.50 n.gld. (kun membreco kaj jarlibro 10 n.gld.).

Ĉefdelegitoj kaj Perantoj en multaj landoj.

* * *

Tarifo por reklamoj:

1 paĝo	128.— gld	1/2 paĝo	64.— gld
1/4 paĝo	32.— gld	1/8 paĝo	16.— gld
		1/16 paĝo	8.— gld

Anoncetoj pri korespondado:

0,10 gld por unu vorto aŭ 1 int. respondkuponon por ĉiu duon da vortoj.

Legantoj en 80 landoj

Estraro de U.E.A.:

Prof. D-ro Giorgio Canuto, prezidanto, Via Chiabrera 37, Torino.

Prof. D-ro Ivo Lapenna, ĝenerala sekretario, 77 Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo.

P. M. Mabesoone, vic-prezidanto, estrarano pri financoj, Pythagorasstraat 122, Amsterdam-O, Nederlando.

H. W. Holmes, O.B.E., vic-prezidanto, 38, Fillebrook Road, London E 11, Britujo.

R. Llech-Walter, estrarano pri kongresoj, 5 Quai Vauban, Perpignan (Pyr. Or.), Francujo.

D-ro Inĝ. Giordano Azzi, estrarano pri kulturaj aferoj, viale Giulio Cesare 20, Como, Italujo.

D-ro W. Herrmann, estrarano pri landaj kaj fakaj asocioj, Bürstädterstr. 3, (16) Lampertheim-Hessen, Germanujo.

Centro de Esploro kaj Dokumentado

77, Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo. Telefono: ARNold 90-81.

ENHAVO

Sepdek jaroj de la Internacia Lingvo	109	Esperantista vivo & Nekrologo	114
Morala aliĝo al la U.K.	110	La Juna Vivo	115
La batalo ĉe Go. John Francis	112	CED	120
Tabela trarigardo pri la informa laboro en 1956	116	Koresponda Servo Mondskala	121
Nova granda progreso de informado pri Esperanto	117	Radio	121
<i>Rubrikoj</i>		Novaj libroj	122
Tra la mondo	110	Nia forumo	123
42a U.K.	111	Oficiala informilo	124
		La internaciaj konkursoj	124

Sepdek Jaroj de la Internacia Lingvo

En julio 1887 aperis en Varsovio la unua lernolibro de la Internacia Lingvo por Rusoj. La 40-paĝa libreto konsistis el antaŭparolo, plena gramatiko kaj vortaro Internacia-Rusa kun klarigoj pri ĝia uzo.

El tiu malgranda semeto elkreskis en nuraj 70 jaroj fortika arbo kun profundaj radikoj, abundaj branĉoj kaj densa foliaro. Ĝi estas nekontestebla fakto. Spitante ĉiujn obstaklojn — antaŭjuĝojn, diversspecajn rasismojn kaj ŝovinismojn, militojn, misprezentojn kaj kalumniojn, rektajn malpermesojn — la Internacia Lingvo traboris al si la vojon en ĉiujn partojn de la mondo, penetris en ĉiujn sociajn tavolojn, konstante riĉiĝadis per nova kultura enhavo kaj, paralele, daŭre interne evoluadis. El genia projekto ĝi transformiĝis en nuancoplenan instrumenton de pensado kaj komunikado. Ĝi fariĝis vivanta lingvo, kun tute propra spirito, de vivanta internacia kolektivo.

Antaŭ Zamenhof multaj — inter ili kelkaj veraj gigantoj de la homa penso — serĉis konvenan solvon de la lingva ĥaoso. Post Zamenhof pluraj aliaj klopodis — ĉu pro persona gloremo, ĉu pro nescio aŭ nekompreneo de la problemo — ankoraŭfoje malkovri jam malkovritan Amerikon. Kelkfoje tiuj provo elvokis iom da publika interesiĝo kaj kreis iom da konfuzo. Plejofte ili restis senehaj. Neniu socie enradikiĝis. Kaj pli aŭ malpli baldaŭ — kuinte depende de la disponeblaj financaj rimedoj — ili malaperis unu post la alia en la mallumo de la forgeso.

Kial, do, Esperanto sukcesis, dum ĉiuj aliaj projektoj de komuna lingvo, kvankam ofte verkitaj de rekonitaj lingvistoj kaj apogataj de famaj nomoj, fiaskis?

La kaŭzoj estas pluraj, sed tri el ili ŝajnas al mi esencaj:

1. Zamenhof bone komprenis, ke lingvo internacia devas konsisti el elementoj maksimume internaciaj. Tial li metis en ĝian vortaron radikojn jam internaciĝintajn kaj signis la vojon por plua riĉigo de la lingvo per novaj internaciaj esprimoj. Sed li ankaŭ perfekte komprenis, ke lingvo ne konsistas nur el vortoj; plue, ke, unuflanke, ne ekzistas absoluta internacieco de la vortoj — nek laŭenhave, nek laŭforme — kaj ke, aliflanke, por atingi facilecon estas necese ordigi kaj sistemigi tiun internacian lingvomaterialon kaj liberigi ĝin de balastaj akcesorajoj kaj absurdaĵoj. Tial, ekzemple, Esperanto havas fonetikan ortografion. Tial en ĝi ĉiu elemento ricevis difinitan signifon kaj la tuta lingvo aglutinan karakteron kun plej simpla gramatika strukturo. Per la sistemo de afiksoj la Internacia Lingvo akiris vastajn eblecojn de subtila derivado. Tio unuavide kelkfoje iom ĝenas la t.n. „tujan kompreneblecon”, per kiu kelkaj ĉarlatanoj aŭ pseŭdosciencaj fabrikantoj de novaj projektoj blufas personojn jam parolantajn plurajn okcidenteŭropajn

lingvojn, sed ĝuste tio donas al la lingvo multe pli grandan, *veran kaj realan, internaciecon*: ne, kompreneble, el vidpunkto de difinita grupeto da nacioj kaj de iliaj intelektaj satelitoj, sed el vidpunkto monda. Samtempe tiuj karakterizoj treege helpas la rapidan ellernon de la lingvo kaj ebligas ĝian *tujan praktikan uzon* skribe, lege kaj parole ne nur en Okcidento, sed sur ĉiuj kontinentoj; ne nur fare de kleruloj, sed ankaŭ fare de la plej ordinaraj homoj.

La moto „Por ke lingvo estu tutmonda, ne sufiĉas ĝin nomi tia”, presita sur la kovrilpaĝo de la unua lernolibro, entenas fundamentan principon de unuaranga graveco.

2. Lingvo estas *socia fenomeno*. Por ke ĝi povu meriti la nomon de lingvo, ĝi devas kontentigi ĉiujn bezonojn de pensesprimado de difinita homgrupo. Tio signifas, ke ĝi ne povas esti limigita nur al scienco aŭ nur al kiu ajn alia speciala fakto, kiel kelkaj sciencobseditoj erare pensas, sed ĝi devas rilati al ĉiuj homaj aktivecoj. Tio plue signifas, ke ĝi povas esti evoluigita ne de tiu aŭ alia unuopulo — eĉ ne de plej genia — sed nur *de la tuta kolektivo, kies spirita proprieto ĝi estas*, surbaze de ĝiaj efektivaj bezonoj. Ankaŭ tiun grandan veron Zamenhof bone komprenis. Li tuj „forcedis ĉiujn personajn rajtojn” je la lingvo kaj akcente deklaris jam en la unua lernolibro: „Internacia Lingvo, simile al ĉiu nacia, estas propraĵo socia”. Precize tia ĝi estis kaj estas konsiderata de tiu internacia kolektivo, kiu ĝin akceptis ne por eksperimente aŭ lude pasigi la tempon dum ripoza neniofarado, sed por utiligi ĝin en siaj internaciaj rilatoj.

3. Sendube, la lingvaj malfacilaĵoj troviĝas en la radikoj mem de la ideo de komuna supernacia lingvo. Sed tiuj malfacilaĵoj fariĝas objektivaj obstakloj kaj sentiĝas kiel tiaj ĝuste tial, ĉar oni ekkonceptas la homaron kiel principe unuecan kaj la mondon kiel principe tutecan. Animo delikata kiel tiu de Zamenhof ne povis ne eksenti tion, des pli ke li naskiĝis, edukiĝis kaj vivis en medio plurnacia, saturita de reciproka intergenta malamo. Tute nature, do, li enspiris en la lingvon spiriton de humaneco kaj internaciismo. Ankaŭ tiurilate lia subjektiva penso harmonie akordis kun la objektivaj formiĝantaj kondiĉoj.

La *humaneca internaciismo* — hodiaŭ praktikata kaj flegata en sia plej pura formo nur en la Esperantismo — estis kaj estas potenca ideo fono de la lingvo. Ĝi donis al la Internacia Lingvo koron kaj animon, tute specialan karakteron kaj apartan fizionomion. Kaj sen tiuj neniuj lingvo povas vivi, kreski kaj maturiĝi.

La proporcie ekvilibra kombino de la tri tuŝitaj elementoj kaŭzis la plenan sukceson de Esperanto el lingvistika vidpunkto. Ilia rigora kaj senkompromisa observado estas unu el la garantioj por la plua disvastiĝo kaj evoluo de la Internacia Lingvo.

Prof. D-ro Ivo Lapenna

TRA LA MONDO

• **Radio Sofia dissendas en Esperanto.** Ekde la 2a de junio Radio Sofia komencis regulajn dissendojn en Esperanto. La dissendoj okazas ĉiudimanĉe dum 25 minutoj (vd. la rubrikon „Radio” sur p. 121). Dezirinde estas, ke Radio Sofia ricevu amase salutojn de geesperantistoj, esperanto-societoj kaj esperanto-asocioj el la tuta mondo.

• **Novaj poŝtmarkoj dediĉitaj al Esperanto.** La 9an de junio aperis en Hungarujo du novaj poŝtmarkoj dediĉitaj al Esperanto, koincide kun Esperanto-Ekspozicio aranĝita en la plej granda kulturdomo de Budapeŝto. En la ekspozicio funkciis poŝtofiĉejo, kiu uzis memorstampon. Sur nia kovrilo oni vidas foton de la du poŝtmarkoj. La 60-filera estas ruĝa, la 1-forinta, kun portreto de Zamenhof, estas verda.

• **Esperanto-kongreso raportita en la brita radio.** La 26an de aprilo, kun ripeto la 27an de aprilo, dum la programo „La semajno en la okcidento”, oni informis pri Esperanto dum proksimume kvin

minutoj, okaze de la 41a Brita Kongreso de Esperanto. Intervjuita estis s-ro Gething, Prezidanto de la Londona Klubo, kaj s-ro Bertram Potts el Novzelando. La 6an de majo, en la eksterlanda servo de B.B.C., oni disaŭdigis dum kvar minutoj intervjuon kun s-ro Potts, f-ino Nixon kaj s-ro Gething.

• **Brazila Instituto de Geografio kaj Statistiko pretigas novan libron en Esperanto.** Pri la bela urbo de la 15a Brazila Kongreso de Esperanto estas en preparado tre interesa libro kun multaj kliŝoj, en kiu aperos: Resuma Historio de Niterói, de Renato Lacerda; Limoj kaj longeco de la dividlinio; Areo, loĝantaro kaj demografia denseco; ŝtataj produktoj el minerala origino; ŝtata terkultura produktado; industria produktado; soseoj; k.s. Tiun interesan libron eldonos baldaŭ la Brazila Instituto de Geografio kaj Statistiko. Pliajn informojn oni povas peti de Brazila Esperanto-Ligo, Praça da República, 54 — 1º, Rio de Janeiro, Brazilo.

• **Fervojiŝta Kongreso uzis nur Esperanton.** En Rijeka, Jugoslavio, okazis de la 11a ĝis la 17a de majo la 9a Internacia Kongreso de Fervojiŝtoj Esperantistaj. Aligis al la kongreso 494 fervoĵistoj el 14 landoj. La solenan malfermon salutis Blagoje Bogavac, ĝenerala direk-

toro de jugoslavaj fervojoj, Rade Vuckovic, Prezidanto de Centra Komitato de fervoĵista sindikato, la urbestro de la distrikto Rijeka, Eduard Jardas, kaj la direktoro de Fervojdirekcio Zagreb, Franjo Culjak. Inter la laboroj de la kongreso estis diskuto pri la terminara laboro nun plenumata. Okaze de la kongreso la ilustrita monata fakrevuo „Zeleznice” (Fervojoj) aperis dulingve sur 40 paĝoj — ĉiu teksto aperis ankaŭ en Esperanto.

• **Esperanto-programo en poliglota societo.** Memore al la 10 jara fondiĝo de la grava poliglota societo „Lingua Club en Manresa, Hispanujo, (kies fondiĝon iniciatis esperantisto Modesto Fuset), ties Esperanto-Fako aranĝis dum tuta semajno propagandan programon kun ekspozicio, prezento de filmo kaj prelegoj.

• **Barcelono-Provinca Renkontiĝo de Esperantistoj.** En Sabadell, Hispanujo, okazis la 1-an de majo renkontiĝo de la provincaj esperantistoj, kiun ĉeestis ĉirkaŭ 200 samideanoj el Barcelona, Tarrasa, Sabadell, Manresa, Moyà kaj Sta. Coloma de Gramanet.

• **Ĉu vi konis Zamenhof?** S-ro Norman Williams, (Lernejestro), Egerton Park School, Denton, Manchester, Anglujo, komencis verki novan libron pri la vivo de Zamenhof por anglaj infanoj. Li kolektas eĉ la plej malgravajn detalojn pri la Majstro kaj pri liaj infanoj, speciale pri Lidja. S-ro Williams petegas ĉiun kiu havas tian informon skribi al li. Li ankaŭ serĉas helpantojn kiuj loĝas en iu „Zamenhofa urbo” kiuj estos pretaj serĉi informon eĉ lokaj arĥivoj k.t.p.

• **Korekto en la Jarlibro.** En la Jarlibro 1957, la Parto, sur p. 80, erare aperis informo, ke la lernilo **Udzbenik medunarodnog jezika Esperanto de Dragoljub Ivošević** estas eldonita de la Esperanto Societo, Beograd. Tiun lernilon, kiu konsistas el ciklostilitaj folioj, estas privata eldono de la aŭtoro.

• **Nova aranĝo en „Granda Paradizo”.** Prof. D-ro Giorgio Canuto, prezidanto de UEA, ĉeestis en „Granda Paradizo” dum la somera aranĝo de Itala Esperanto-Federacio. Reveninte el la U.K. en Marseille, li prelegos en Ceresole Reale dimanĉon la 18an de aŭgusto antaŭ la esperantistaj gastoj kaj la aŭtoritatoj de tiu fama turisma centro de italaj Alpoj. Pasintjare, esperantistoj el kvin landoj partoprenis la „Paradizajn Feriojn” kaj ankaŭ ĉijare oni antaŭvidas multnombrian ĉeeston de eksterlandaj gastoj dum la tri semajnaj vicoj de la manifestacioj. Mendu la ilustritan prospekton ĉe: Turismoficejo de Itala Esperanto-Federacio, Casella Postale 248, Torino.

• **Esperanto en Foiroj.** De la 8a ĝis la 22a de majo okazis la XXI Foiro de Bologna (Italujo), en kies kadro okazis ankaŭ manifestacio Esperanta, organizita kunlabore kun la estraro de la Foiro, kiu oficiale ekuzis la internacian lingvon. La

Grava Informo!

Morala aliĝo al la U.K. en Marseille

La LKK kaj la KKS faris ĉion eblan, por ke la Universala Kongreso en Marseille estu labora, interesa, amuza kaj ĉiurilate alloga. La aprobita programo promesas vere altnivelan semajnon en plej agrabla atmosfero.

Malgraŭ tio, la nombro de aliĝintoj estas relative malgranda. Kvankam sendube multaj aliĝos en la lasta momento, tamen tute certe en Marseille ne estos tiom da kongresanoj, kiom estis en Kopenhago. La kaŭzo verŝajne estas, ke la ĉi-jara kongresurbo situas iom fore. Konsiderante, ke tre probable multaj esperantistoj, kiuj ne povos persone ĉeesti la kongreson, deziras tamen ligiĝi kun la ĉefa jara manifestacio de la Esperanto-Movado, la Estraro de U.E.A., interkonsente kun la LKK, decidis enkonduki ĉi-jare specialan „Moralan Aliĝon” al la 42-a Universala Kongreso en Marseille. La

kotizo por tiu-ĉi Morala Aliĝo estas 1.000 fr. fr. aŭ egalvaloro. La Morala Aliĝo ne rajtigas al partopreno en la aranĝoj de la kongreso, sed ĉiu kiu pagos la kotizon de Morala Aliĝo ricevos la Kongresan Libron kaj ĉiujn aliajn dokumentojn.

La kotizon por la Morala Aliĝo oni povas pagi aŭ al la LKK per ĝirkonto Groupe Esperantiste, Marseille, N-ro 156-15, aŭ per la banko James Rosa, Marseille, aŭ al la kutimaj perantoj, kies adresoj estas publikigitaj en la oficialaj bultenoj. Kotizojn akceptas ankaŭ la Centra Oficejo de U.E.A., 7, Eendrachtsweg, Rotterdam, C.

La Estraro estas konvinkita, ke multaj esperantistoj utiligos tiun-ĉi eblecon kaj subtenos per Morala Aliĝo mian ĉi-jaran Kongreson, havigante samtempe al si belan kaj valoran memoraĵon.

Prof. D-ro Ivo Lapenna
Ĝenerala Sekretario de U.E.A.

temo de la manifestacio estis: „La apli- kado de Esperanto al la Industrio, Komerco kaj Turismo”.

La Internacia Foiro de Marseille, 36, La Cañebière, Marseille, ekde 1932 montriĝis favora al la uzado de Esperanto kaj ĉiujare la estraro de la Foiro akceptas la esperantistojn dum la „Esperanto-Tago”. La Foiro okazas dum la dua duono de septembro.

● **Belaj turismaj prospektoj pri Aosta.** La Regiona Oficejo por la Turismo en Aosta (Italujo) eldonis du prospektojn en Esperanto. Unu el ili montras la arĥeologiajn vidindaĵojn de la urbo, la alia, belkolora ilustrita, montras la diversajn regionajn tradiciajn kostumojn.

● **La Internacia Studenta Centro HALD** eldonis esp-lingvan prospekton, kiu donas detalojn pri la kulturaj feriaj aranĝoj por studentoj, kiuj estas aranĝitaj de la 3a de junio ĝis la fino de septembro 1957. La aranĝoj estas malmultekostaj. Oni petu detalojn ĉe Internacia Studenta Centro, HALD, Danlando.

● **Esperanto en la gazetaro.** En „Cal”, dentista revuo eldonata en Chicago, Usono, aperis interesa 4-paĝa artikolo de nia samideano Lehman Wendell (tradukinto de „La lasta Usonano”) sub titolo „Esperanto kiel kromokupo”. „International Aviation Review”, plurlingva revuo pri aviado, kiu estas eldonata en Zürich, Svislando, enhavis en sia aprila numero artikolon de D-ro Baur en Esperanto pri „Esperanto en la aviado”. „Repubblica” (Lisbono, Portugalujo) daŭrigas sian rubrikon „Cronica Esperantista” per artikolo en sia numero de la 20a de majo „Filatelio kaj Esperanto”, de Saldanha Carreira.

● **Nova propaganda gazeto en Pollando:** La Asocio de Esperantistoj en Pollando ĵus eldonis en 18,000 ekzempleroj novan propagandan gazeton „Esperanto — język miedzynarodowy” (Esperanto lingvo internacia), bele produktita sur 8 grandformataj paĝoj, kun plej diversaj trafaj artikoloj en pola lingvo. Bonega kaj gratulinda iniciato.

● **Graĵoj en vento.** Korekto (vidu

numeron de majo). La numero de la poŝtekkonto de GEV estas: „Graĵoj en Vento”, Marcel Erbetta, IVa 9485, rue des Pins 66, Bienne, Suisse.

● **La urba konsilantaro de KNIT-TELFELD** en Stirio, Aŭstrujo, decidis la 6.12.1956 unuanime, parton de strato en la centro de l’urbo nomigi „Esperantostrasze”. La loka Esperanto-Societo „VERDA STELO” nun eluzas tiun okazon kaj aranĝos la 7 kaj 8 de Septembro solenan inaŭguron de tiu strato en la kadro de „Esperantofest” de l’aŭstra esperantistaro pro la 70 jara ekzisto de nia mondlingvo kun Esperanto-Ekspozicio de la Stiria Landbiblioteko kaj invitas elkore ĉiujn gesamideanojn en la en-kaj eksterlando, multnombro partopreni sian feston. Anoncoj estu direktataj al la kasiso s-ano Lorenz Stocker en Knittelfeld, Schmittstrasse 12.

La kotizo de 15 ŝilingoj aŭstraj aŭ 8 Steloj estu pagata al la poŝtsparkasa konto n-ro 14.920 de Sparkasse der Stadt Knittelfeld, kio povos okazi el ĉiuj landoj de l’okcidento.



42-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Marseille — 3.10 aŭgusto 1957 — Francujo

Adreso: 32, Cours d’Estienne d’Orves, Marseille, Francujo.

Telefonoj: PRado 55-46; Ferréol 96-18.

Telegrafo: Esperanto.

Banko: James Rosa, Marseille.

Ĝirkonto: Groupe Esperantiste - Marseille n-ro 156-15.

mann, gvidanto de la Eŭropa-Kampanjo).

— „Rotary kaj Esperanto”

— „Esperanto kaj Katolikismo”

La serio estas daŭrigota. Mendinte artikolon citu la gazeton en kiu ĝi aperos. Nekongresanoj aldonu du respondkuponojn.

Teatraĵoj. Pro lokaj malfacilaĵoj, la Loka Kongresa Komitato decidis, ke anstataŭ „Topaze” de Pagnol kongresa teatraĵo estu la komedio de Molière „Georgo Dandin”, ludata de la Esperantista Teatra Trupo de Barcelona gvidata de s-ro Francesc Vilà.

Morala kotizo: Interkonsente kun la Estraro de U.E.A., la Loka Kongresa Komitato decidis starigi moralan kotizon por tiuj esperantistoj kiuj, malhelpataj partopreni en la Kongreso, tamen deziras ricevi la kongresajn libron, insignon kaj aliajn dokumentojn kaj finance subteni la ekonomion de la Universala Kongreso. La Loka Kongresa Komitato apelacias al la esperantistoj kaj al la esperantistaj asocioj en la tuta mondo multnombro morale aliĝi. La kotizo estas 1000.— fr. fr.

Statistiko: (ĝis fino de majo) Alĝerio 4, Aŭstrujo 22, Aŭstralio 1, Belgujo 15, Brazilo 4, Britujo 69, Bulgarujo 28, Ĉeĥoslovakujo 5, Danlando 26, Finnlando 10, Francujo 368, Germanujo 95, Grekujo 1, Hispanujo 36, Hungarujo 2, Italujo 116, Izraelo 1, Jugoslavio 48, Japanujo 2, Kongo Belga 2, Maroko 14, Meksikio 2, Monaklando 3, Nederlando 42, Norvegujo 14, Novzelando 4, Pollando 8, Portugalujo 5, Rumanujo 2, Sudafriko 2, Svisujo 23, Svedujo 120, Turkujo 2, Usono 6, Venezuelo 1. Entute 1103 el 35 landoj.

Gian Carlo Figliera
Konstanta Kongresa Sekretario

Sub la protektado de S-ro René COTY, prezidanto de la Franca Respubliko.

OFICIALA KOMUNIKO

N-ro 9 Junio 1957

Nova kunsido: Anoncis fakkunvenon: — Veterana Esperantista Klubo”.

Urba vizito: La firmao NESTLE invitas 80 kongresanojn al vizito en Marseille de sia plej moderna eŭropa fabriko. La vizito okazos dum la kongresa jaŭdo, ekskursata tago. Interesuloj bonvolu anonci sin per poŝtkarto al la Kongresa Oficejo.

Aliaj vizitoj: Kongresanoj, kiuj deziras partopreni en la senpaga ŝipvizito de la Haveno aŭ en la faka vizito al la radio-televidaj instalaĵoj de Marseille bonvolu anonci sin per poŝtkarto al la kongresa oficejo.

Unuataga koverto: La Kongreso eldonos kovertojn kaj ilustritajn poŝtkartojn kun oficiala unuataga poŝtstampo pri la Universala Kongreso:

10 kovertoj afrankitaj 15 Fr (ordinara afranko por leteroj en Francujo) = 540 Fr.

10 kovertoj afrankitaj 30 Fr (afranko por eksterlando) = 630 Fr.

10 ilustritaj poŝtkartoj afrankitaj 12

Fr (kun teksto en Esperanto) = 540 Fr.

10 ilustritaj poŝtkartoj afrankitaj 18 Fr (kun teksto en Esperanto) — afranko por eksterlando = 630 Fr.

La unuatagaj kovertoj kaj poŝtkartoj estos vendataj ankaŭ al la filatelista merkato.

Gazetara servo: La Kongresa Gazetara Servo, internacia branĉo, disponigos al kongresanoj kaj esperantistoj neĉeestintaj en la Kongreso laŭelekto unu el la subaj artikoloj por traduko en nacian lingvon kaj por aperigo en taŭgaj gazetoj:

— „Tutmonda Kongreso sen interpretistoj” (s-ro G. C. Figliera).

— „Lingvoj kontraŭ scienco” (D-ro Waysblum).

— „Instruistoj kaj la Internacia Lingvo” (s-ro J. Beau, Agregacia Profesoro, lingvo-instruisto).

— „Lernejo kaj moderna universalismo” (f-ino J. Dedieu, lingvo-instruistino).

— „La lingva problemo en la Eŭropa Federacio” (d-ro W. Herr-

La batalo ĉe Go

El la multaj bataloj okazintaj en la historio de Juglando neniu estis pli eventa ol la unika batalo ĉe Go, je kiu finiĝis la miljara paco.

La miljara paco estis rimarkinda fenomeno en si mem. Okazis, ke gravaj instancoj en Juglando kaj ties najbaraj landoj tiom enuis pri senĉesaj militoj kaj militetoj, kiuj portis nenium profiton al iu ajn, ke ili interkonsentis elprovi la teorion, kiu asertas, ke milito aŭtomate eliminiĝos, kiam ĉie virinoj regos anstataŭ viroj tial, ke virinoj estas molkoraj kaj cetere naskas infanojn. La Komisiono por la Konservado de la Paco, kiun starigis Juglando kaj ĝiaj najbaroj, do rekomendis, ke la membroŝtatoj deponu sole virinojn al siaj ministerioj por eksteraj aferoj, kaj la reprezentataj registaroj senescepte komplezis. La sekvinta militigo konvinkis pri la neceso fari pli drastan demarŝon, kaj post multaj kunidoj la nova K.K.P. trovis solvon, kiu rezultigis la miljaran pacon.

La decido de la komisiono sumiĝas jene: „Tial, ke ŝtatestro respondecas antaŭ sia popolo pri ĉiuj registaraj decidoj, ke militdeklaro estas registara decido kaj ankaŭ krimo kontraŭ la popolo, sekve la estro de militdeklarinta lando estu juĝata ŝtatperfidulo. Simile, la estro de lando kontraŭ kiu oni deklaras militon estu juĝata ŝtatperfidulo tial, ke li ne sukcesis evitigi la deklaron. En tiu ĉi konekso agreson oni taksu militdeklaro. Kondamnita ŝtatestro rajtos fari dekretojn antaŭ sia ekzekuto nur kontraŭ la propra eksregistaro”.

Estas rimarkinde, ke malgraŭ patosaj oracioj, kiujn faris vaste konataj ŝtatistoj kontraŭ tiu ĉi kruela decido, tamen la popoloj vivantaj en la tiama barbara epoko akklamis ĝin kun sendiskreta entuziasmo, kaj la iniciatintoj senprokraste elektis ekzekutajn komitatojn en la koncernaj landoj kun plena subteno de la publiko. Tiuj komitatoj respondecis sole al la K.K.P., kaj ĉiu regnestro devis akcepti ilin en sian personan gvardion. Subaĉeton oni evitis per regulaj ŝanĝoj kaj altegaj salajroj.

En la komenco militoj tamen okazis, kiam tiu kaj alia regnestro aŭ registaro riskis spiti sian komitaton, fidante al la armeo savi lin de la puno; sed en ĉiu okazo la subteno de fortaj instancoj kaj la publiko garantiis la funkciadon de la komitato, kiu cetere neniam malhelpis komencintan militon; ĉar la plano celis nur laŭgrade sed certe elimini ekmilitadon, kaj tion ĝi ja atingis.

Ĉiu kondamnita regnestro, elprofitan-


te la rajton dekreti kontraŭ sia registaro, verdiktis mortkondamnon al la ministroj, kies fuŝoj kaŭzis lian malfeliĉon. Tiujn dekretojn oni povis sen iu malhelpo efek-

★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★
de
★ **John Francis** ★
★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★

tivigi, ĉar kiuj ne subtenis pro bonvolo al la K.K.P., tiuj aprobis pro lojalo al sia suvereno.

La ŝtatestroj komencis fervore klopodi kontraŭ eventualaj fuŝekmilitoj de siaj registaroj, kaj politikistoj ekkredis siajn porpacajn paroladojn. Tiel komenciĝis la miljara paco.

Kvankam oni iom hiperbole aplikas la epiteton „miljara”, tamen la paco ja daŭris dum kelkaj jarcentoj, kaj tutaj generacioj vivis kaj mortis en Juglando konante nenion pri milito, krom tio, kion ili legas. Pluraj el la aliancaj ŝtatoj ĉe la limo de la K.K.P.-sfero devis ja defendi sin kontraŭ barbarinvado foje, sed Juglando kaj ĝiaj plej apudaj najbaroj estis sekuraj kontraŭ tio, estante en la mezo de la alianca teritorio.



Neniu suvereno pli bone sciis regi sin ol la sagaca Patraso de Gimdalo.

La Paco do daŭradis, malgraŭ fojaj minacoj pri ekmilito, kiam prajukoj tro incitis, ĝis la regno de Zefreno III el la Enkreta dinastio. En tiu epoko estis jam evidente, ke la K.K.P. havas nenium efektivan ekziston, ke la KEK'oj (Kontraŭmilitaj Ekzekutaj Komitatoj) antaŭlonge inertigis, ke la pacenuaj popoloj sopiras revivigon de la heroaj tagoj, kiujn priskribas la necensurebla klasika literaturo, kaj cetere deziras vidi la armeojn pravigi siajn salajrojn per io pli ol paradoj; sed dum longa tempo nura kutimo kaj la parkeritaj avertoj kontraŭ milito sukcesis deteni la reĝon de militdeklaro.

Tamen, la rilatoj inter Juglando kaj la malnova malamiko, Gimdalo, pli kaj pli akriĝis, kaj Zefreno kaj la tiama gimdala reĝo, Patraso, iĝante pli kaj pli kuraĝaj pro la daŭra inerto de la K.E.K.'oj kaj la kreskanta entuziasmo de la popoloj, ekinĉitis sin reciproke per unue etaj, kaj poste pli grandaj, ofendoj. Notante, ke la K.E.K.'oj restas inertaj, ili komencis malkaŝe menciigi militon en siaj publikaj paroladoj, klarigante ke kvankam neniu deziras militon, tamen oni devas defendi sin kontraŭ agreso, kaj ke oni ne povas malhonore kliniĝi antaŭ minacoj; eĉ la K.K.P. ne kontraŭstarus tion, ke viro protektu sian familion; eĉ K.E.K. ne agas kontraŭ homo, kiu defendas al si la vivon! La K.E.K.'oj datre inertis.

Fine la krizo venis. Zefreno akuzis, ke Patraso provis inciti Juglandon al milito per intenca ofendo kontraŭ ĝia glora suvereno — li, Zefreno la Trankvila — per tio, ke en la plej lasta gimdala ultimato al Juglando oni ellasis la frazon „Defendanto pri la Paco” en la titolaro de Zefreno. Kvankam li povus repagi tiun ofendon per la glavon, tamen li ĉiam pretas oferi por la pacodaŭro, kaj tial li nun donas al Patraso la okazon nuligi tiun tamen intencan ofendon per juro, ke nur pro stulto, kaj ne pro malico, tiu enlasis la ellason.

Neniu suvereno pli bone sciis regi sin ol la sagaca Patraso de Gimdalo. Leginte la akuzon, anstataŭ eksplodi furioze, li simple mallevis la palpebrojn iom pli ol kutime, karesis sian barbeton per la dekstra montrofringro, kaj poste per tiu sama faris signeton, tre elegante, ke oni lasu lin sola dum li elpensos la aferon. La gimdala korteganoj kaj ministroj lasis la reĝan personon konjektante pri la patrasa reago, kaj certigante reciproke sian lojalan subtenon al iu decido de la reĝo.

La sekvintan tagon la respondo venis. Patraso publike dementis la akuzon de Zefreno, kaj aldone proklamigis sian opinion, ke en la vorto „Enkreta” la unua silabo devus sekvi la duan. Post tiu aserto nenio povus prokrastiĝi la finon de la miljara paco, ĉar Zefreno juĝis ĝin (la aserton) malrespekta aludo al la enkreta dinastio, kaj la militdeklaro de Juglando kontraŭ Gimdalo estis nura formalo.

Dum ioma tempo ambaŭ landoj staris iom hezite antaŭ la demando „Kion fari nun?” sed fine ili paradigis siajn armegrupojn tra la diversaj kvartiraj urboj, kaj amasiginte ilin ĉe konvenaj rende-



Fine la du armeoj renkontiĝis en la valo Go...

vulokoj, marŝigis ilin al la komuna landlimo. La armeoj kun siaj flirtantaj standardoj, poluritaj kaskoj kaj kiraso, kaj la ritmaj paŝadoj, kiujn ili perfektigis dum la serenaj tagoj de la Paco, vekis fervoran admiron kaj entuziasmon inter ĉiuj, kiuj vidis ilin preterpasantaj.

Tamen, nun venis la unua averto, ke oni forgesis multon pri la praktika militado dum la Paco, ĉar ambaŭ komandantoj malzorgis asigni spionojn rezulte, ke la armeoj pretermarŝis unu la alian, ĝis la juglanda trovis sin en gimdala teritorio, kaj la gimdala en juglanda, ne kontaktinte la malamikon. La soldatoj sidis en granda embaraso sentante, ke ili devus aflikti la popolojn per iuj kruelajoj konforme kun milithistorio, dum la popolojn regis teruro pro la sama penso. La problemo, tamen, baldaŭ solviĝis, ĉar la popoloj de la invaditaj terenoj ekspedis kurierojn post siajn armeojn kun informo pri la malamiko, kaj konstatinte la situacion, ambaŭ generaloj turnis siajn kolojn retroire. Tiel, kiel oni poste diris, ili retretis al batalo.

Fine la du armeoj renkontiĝis en la valo Go ĝuste sur la juglandgimdala landlimo, kaj tie defilis prelude al batalo. La juglanda generalo, Marŝalo Baŭrtufo, estis tre sperta pri militteorio, ĉar li havis pli ol sepdek jarojn, kaj cetere estis veterano de la preskaimilito, kiu okazis antaŭ pli ol kvardek jaroj, kaj nun li montras sian sperton per la metia aranĝo de siaj korpusoj. La kavalerion li dividis en du egalajn partojn, kiujn li starigis sur la ekstremajn alojn iom antaŭe; la infanterion li lokigis en la mezon laŭ alternaj rotoj de halebardistoj-arkpafistoj kaj kirasataj falangoj tiel, ke la falangoj povos senembarase avanci lasante al la halebardistoj la rezultintajn breĉojn en la fronto; inter la infanterio kaj la kavalerio la militĉaroj viciĝis, frontante oblikve, kaj malantaŭe la artileriaj baterioj grupiĝis.

La gimdala korpusaranĝo necese diferencis de la malamika, ĉar la gimdalanon ankoraŭ atribuis ĉefan rolon kiel militilon al la ĉaro ĝis tuj antaŭ la ekpaciĝo, kaj ĉar la dumpacaj armeoj de ambaŭ landoj neniel ŝanĝiĝis laŭ principo, la gimdalanon nun disponis pri pli da ĉaroj ol la jugoj. Ilia komandanto, Generalo Alko, do postenigis siajn ĉarojn kun konvenaj manovrospacoj laŭlonge de sia tuta fronto, utiligante sian relative malmultnombran kavalerion nur por gardi la

flankojn konforme kun gimdala milittekniko. La unuaj vicoj de la infanterio konsistis el kurtrupoj portantaj nur malpezajn armilojn, kies funkcio estis subteni la ĉaratakojn, dum malantaŭ ili spaliris la halebardistoj-arkpafistoj. La artilerio, kiel la juglanda, grupiĝis malantaŭe.

Baŭrtufo fiere rigardis siajn batalionojn, domaĝante en la koro, ke iam necesos rompi tiun perfektan formacion. Tamen, fine li donis la ordonon komenci la batalon per bombardo. La artileriaj oficiroj ripetis la ordonon; la suboficiroj kriis instrukciojn, kaj la pezigitaj traboj ĝemis sub la tirado de la rimenoj. Sed nun okazis io neatendita: tie kaj tie rimenoj, kies sola funkcio ĝis nun estis aspekti kiel eble plej maltrudaj dum paradadoj, ekrompiĝis, kaj la duone viciĝitaj traboj subite resaltis jetante siajn ŝarĝojn nur kelkajn metrojn antaŭen — inter la juglandan infanterion. Aliaj trupoj sukcesis plenstreĉi siajn maŝinojn, sed liberiginte la trabojn trovis, ke la pezigitan falparton implikas diversaj ornamaĵoj, kiujn oni aldonis de tempo al tempo cele al paradkonveno. Rezulte de tio, la traboj ne plene pivotis, kaj la ŝtonegoj ĵetiĝis rekte vertikalen, poste refalante laŭ maloportune reciprokaj trajektorioj. Kelkaj baterioj, kies komandantoj insistis, ke laŭlogike la ŝargita fino devas fronti la celdirektojn, nun pruvis la malpravon de la teorio. Unu-du maŝinoj ja ĵetis siajn ŝarĝojn laŭ ĝusta direkto, sed sen granda efiko.

Ĉion ĉi Baŭrtufo rimarkis des pli ĝe-

nate pro tio, ke unu el liaj junaj staboficiroj jam sugestis tre respektplene, ke artilerio taŭgas sole laŭ la faktibro por atakoj kontraŭ redutoj, kaj nun tiu ŝajnis rigardi la malsukceson kun nekonzvena trankvilo. „Nu, Zelakto”, lin alparolis Baŭrtufo ironie, „estas bonŝance, ke ni posedas pri artilerio spertulon, kiel vi. Post la batalo vi sendube bonvolos praktikigi niajn bateriojn”.

„Dankon, generalo. Volonte, generalo”, respondis la entuziasma junulo.

Dume, la gimdalaĵo funkciadis kun proksimume la sama efiko kiel la juglandaj, sed nun Alko signalis avancon, kaj la ĉaroj ekruĵiĝis antaŭen. Rimarkinte tion, Baŭrtufo ordonis, ke oni arkpafu, kaj avertis la proprajn ĉarojn pretiĝi; sed la fervora Zelakto nun atendiĝis ke kvankam gvidistoj sufiĉas por paradado, tamen en batalo necesas ankaŭ batalant-ĉaristoj — fakto, kiun evidente forgesis la malamiko. Baŭrtufo, memorante, ke bona soldato neniam domaĝas improvizi, tuj ordonis, ke oni deputu po unu infanteriano al ĉiu ĉaro kun kuraĝigo, ke la batalado tute samas, kiel la ordinara krom tio, ke oni glavas kaj lancas de moviĝanta ĉaro; kaj dume faris mensan noton asigni Zelakton al tre interesa posteno, kies sola domaĝo kaj danĝero estis apuda tropika marĉo.

Atendante ĝis en ĉiu ĉaro staras kun parada rekto unu soldato, Baŭrtufo signalas avancon. Tuj la ĉevalaj hufoj kirlas polvon; la radoj post momenta treniĝo



Baŭrtufo fiere rigardis siajn batalionojn...

ekrotacias, kaj la ĉaroj saltas antaŭen — lasante la rigide starintajn infanterianojn sternataj sur la tero. Dume, la arkpafado montriĝas ankaŭ neefika: eĉ pafadon al celtabulo oni malkuraĝigis dum la Paco tial, ke ĝi ne veku mortigemajn dezirojn en la pafantoj; do, ne estis surprize, ke nun la kornaj pafarkoj poluritaj dum jarcentoj por paradoj fleksiĝis nur kun granda malfacilo, kaj foje eĉ rompiĝis. Pluraj arkistoj preskaŭ mortigis sin tenante la ŝnuretojn anstataŭ la arkon antaŭe. La malmultaj sagoj, kiuj direktiĝis ĝuste, falis kelkajn metrojn antaŭ la avancantaj gimdalaj ĉaroj.

Tiuj preskaŭ atingis la juglandan fronton antaŭ ol la ĉaristoj trafis la problemo: kion fari je alveno sen akompanantaj lancistoj. Granda konfuziĝo ekregis; unuj ĉaristoj turnis siajn ĉarojn por reiri rekte al la propra armeo; aliaj ne volante retreti, precipe ĉar montriĝas tute sendangere apud la juglanda fronto, aŭ haltiĝis siajn ĉevalojn kelkajn metrojn for de la malamiko kaj de tie insultadis, aŭ duonturninte la ĉarojn rapidis laŭlonge de la juglanda fronto gestante defie. Ĉio ĉi kaŭzis multajn implikiĝojn, kelkajn koliziojn kaj fojan renversiĝon. En tiun ĉi haoson impetis la senarmaj juglandaj ĉaroj, kaj la tumulto duobliĝis je la klopodoj de ĉiuj retiriĝi, ĉar neniu volis senarme resti inter malamikoj.

Nun ambaŭ generaloj provis ekspluati la situacion sendante la kavalerion elimini la implikitajn senarmajn malamikan ĉaron: sed denove paceduko spitis ilin, ĉar la ĉevaloj, kiuj ĝis tiam kutimis nur al muziko, ordonoj kaj aplaŭdo ĉe menaĝoj kaj paradoj, panikis pro la bruego de la mueliĝantaj ĉaroj, kaj baŭminte elseligis siajn rajdantojn, aŭ turnis sin kaj bridospite galopis el la batalo.

Baŭrtufo ankoraŭ ne rezignis. „Bonŝance”, li diris al sia stabo, „la forto de Juglando dependas ne de niaj ĉevaloj, sed de niaj viroj. Irigu la falangojn”. La ordono disvastiĝis ĝis la falangokomandantoj. „Antaŭen”, tiuj kriis, kaj rigardis kun fiero la peze ritman avandadon de la kompaktaĵoj, kies kroĉataj ŝildoj refulumis ore sub la sunradioj.

Tiuj falangoj estis la fiero de Juglando en la epoko antaŭ la Paco. Tiam ili konsistis el du vicoj de soldatoj en kojnoformaj formacioj. La unua vico glavportanta kunkroĉis siajn ŝildojn, farante tiel kvazaŭ solidan blendon, super kiu ĝi kun glavoj, kaj la dua vico kun lancoj, pikis kaj hakis la malamikon. Dum la Paco oni plilongigis la ŝildojn argumentante, ke apogate sur la tero tiuj protektos la kruojn de la por batali haltintaj soldatoj, kaj levate dum marŝado ŝirmos la kapojn. Poste, aldoninte soldatojn al la mezo, kiuj devas porti la ŝildojn kiel tegmenton kontraŭ eventualaj sagoj kaj aliaj jetaĵoj, precipe ĉe sturmoj kontraŭ redutoj, oni atingis falangon perfekte netan, glatan, ĉiurilate taŭgan por revuo.

Ĉar neebliis vidi la vojon en tiuj testudfalangoj, oni permesis hiateton inter la ŝildoj ĉe la falangopinto por ke la soldato tuj malantaŭ ĝi gvidu la falangon. Tamen, aranĝo tute kontentiga por organizitaj paradoj nun montriĝis ne tre

praktikebla pro la polvonuboj kaj zigzagantaj ĉaroj, kiuj kaŝis iujn fiksitajn objektojn per kiuj la gvidantoj povus orienti sin, kaj la rigardantaj oficiroj vidis la falangojn laŭgrade devojiĝi, konverĝante kaj karambolante unu kun alia.

Vane ili vokis ordonojn, ĉar la enbruegon avancintaj falangsoldatoj ne povis aŭdi. Pluraj el tiuj jam interdisputis, kulpigante reciproke pri la kolizioj; aliaj malfavore komentaris la situacion uzante familiarajn esprimojn pri siaj oficiroj, dum multaj staris kun mallevitaj ŝildoj aŭskultante, aŭ senhelpe atendante ordonojn. La suboficiroj komandantaj la individuajn falangojn perceptinte, ke temos pri maldisciplino se oni ne donos konvenajn ordonojn, kuras reen al la oficiroj por ricevi tiajn. La soldatoj kaptis kelkajn el ili akuzante pri fuĝado.

Estis evidente, ke la batalo nun atingis sian kulminon, ĉar pluaĵn ataktaĉmentojn la armeoj ne disponis, kaj influis la jam utiligitajn pli la batalimpeto kaj aktualaj cirkonstancoj ol la komandantaj voloj. La ĉefa tumulto regis, kie la amasiĝintaj ĉaroj klopodis eligi sin; sur unu flanko la juglandaj falangoj staris rompinte, aŭ senorde reiris al siaj lokoj inter la halebardistoj; sur la alia la diseriĝintaj trupoj de gimdalaj kursoldatoj peliĝis reen antaŭ siaj propaj rapidantaj ĉaroj; en ĉiujn direktojn ankoraŭ forgalopis falintaj aŭ aliel malfruintaj ĉevaloj kun kaj sen rajdantoj.

Notinte ĉion ĉi Baŭrtufo mense analizis la situacion, kaj komentinte, ke la halebardistoj staras firma, tamen agnoskis la batalon sendecida, eldonante sian faman tagordonon; „Ĉar ni ne avancas, ni retretu”.

Ignorante la atentigon de la entuziasma Zelakto, ke retreti fakte signifus avanci ĉar oni tiel ja enirus Gimdalon kaj, ke por vere retreti oni devus avanci tra la malamikon en Juglandon, Baŭrtufo fine sukcesis revoki siajn taĉmentojn, kaj disigi ilin je konvena distanco de la malamiko, marŝigis ilin laŭ la malkruta deklivo de unu el la montoj, kiuj flankis la valon.

Alko nun divenis la intencon de sia kontraŭulo, kaj atentiginte, ke la malamiko retretas, kaj ke la gimdalanon ne intencas lasi ilin invadi Gimdalon, li gvidis sian armeon laŭ la kontraŭa deklivo por eviti embuskon, preter la juglandan armeon, kiu marŝas maldirekten sur la kontraŭa flanko de la batalkampoj, reen al Gimdalo.

Tiel finiĝis la fama Batalo ĉe Go. Ambaŭ flankoj poste pretendis venkon, redifinante laŭkonvene terminojn, kiaj „retreto”, „manovro”, „flankatako” k.s., sed senpartiaj historiistoj ĝenerale juĝas la batalon sendecida.

Tri partoprenintoj mortis pro falintaj ŝtonegoj, unu pro falo el ĉaro, kaj kelkcent portis kontuzojn pro diversaj akcidentoj; sed la Paco estis ja rompita; la praaj malamoj kaj instinktoj releviĝis post la batalo, kaj ĝiajn lecionojn oni bone ellernis tiel certigante, ke postaj ne same sensange rezultiĝis.

Ĉio ĉi emas dubindigi la konkludon de la senpartiaj historiistoj.

ESPERANTISTA VIVO

Naskiĝoj

Cardoso. Al Paulo Amorim Cardoso kaj Mires Meireles Cardoso la 15an de aprilo naskiĝis filo Paulo Amorim Kar-doza Ido.

Matirko. Al Vilma kaj Eugen Matirko (Orlia 4 I, Kosice, Ĉeĥoslovakio) naskiĝis filo Erwin.

Ujlaky-Nagy. Al Tiboro kaj Ilona Ujlaky-Nagy naskiĝis filo Gabrielo-Tiboro la 1-an de majo 1957.

Geedziĝoj

de Caspari-Criach. Geedziĝis la 30an de majo 1957 norvega samideano Herbert de Caspari kaj hispana samideano Jozefa Criach. La hejmo de la internacia paro troviĝas en Oslo.

Fischer-Korthals. La 2an de majo 1957 geedziĝis Horst Fischer kaj Edelgard Korthals.

NEKROLOGO

Golubiĉ. En Cleveland, Ohio, subite forpasis la 11an de marto 1957 s-ro Petro Golubiĉ, redaktoro de „La Kruco”.

Krestanova. Forpasis Rada Haralampieva Krestanova (baba Lala), naskita en Pirdop la 4.5.1863, forpasinta en Sofio la 10.5.1957, la patrino de nia bulgara samideano I. H. Krestanov.

Langgaard. En Aprilo mortis Kristian Langgaard, 63-jara, post longjaraj malsanoj, entuziasma apostolo por Esperanto en Danlando.

ESPERANTO ĈE INTERNACIAJ KONGRESOJ

En Dubrovnik (Jugoslavio) „Perlo de l'Adriatiko maro” okazas ĉiujare po kelkaj internaciaj kongresoj. Kongresejo estas kutime bela kaj konvena domo de la Artgalerio (Umjetnicka galerija) ĉe mara rando. Inter kvina kaj dekunua de majo ĉi jare estis tie la kongreso de la Asocio Internacia por Sociala Sekureco (AISS). Tiun ĉi fojon estis aranĝita en plej trafika koridoro Esperanta angulo — bela klubgarnituro kun esperantaj (afiŝo pri sociala sekureco esperantlingve eldonita de kongresanta organizo, seslingvaj folietoj pri Esperanto kaj kelkaj revuoj).

Depost nun estos en tiu domo aranĝita io simila ĉe ĉiu tiea kongreso. Por ĉijare estas antaŭviditaj kongresoj de skiistoj (9-an ĝis 11-an de junio) kaj artistoj de plastika arto (pentristoj kaj skulptistoj, fine de septembro).

Por pli bone prepari poresperantan agadon dum la kongresoj oni petas:

1. Sendu al Umjetnicka galerija, Dubrovnik esperantajojn, ĉi jare precipe prisportaj kaj priartaj.

2. Ĉiuj eventualaj kongrespartoprenontoj esperantistoj anoncu sin al la direktoro de la galerio (Josip Vrančić).



LA JUNA VIVO

Ĉion por la redakcio de „L. J. V.” sendu al:

Nicola Minnaja,

Viale Giulio Cesare 223, ROMA, Italujo

INTERNACIA JUNULAR-KUNVENO SUR FELDBERG

De la 18-a ĝis la 23-a de aprilo 1957 okazis en la bela junulargastejo Hebelhof sur Feldberg apud Tittisee en la Germana Federacia Respubliko Internacia Junular-kunveno, organizita de la Landa Ligo Baden de Germana Esperanto-Junularo. Ĉeestis junaj Esperantistoj el Francujo, Germanujo, Svislando kaj Sarlando, inter ili du estraranoj de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo, Richard Reuchlin kaj mi, kaj la vicprezidanto de la Svisa Esperanto-Junularo, Max Abegg. Sub la lerta gvidado de nia „paĉjo” Voldemaro von der Ley disvolviĝis la programo, kies ĉefa kontribuanto estis profesoro doktoro William Perrenoud, kiu en pluraj kunsidoj parolis pri la „Ora Metodo” kaj pri la „Geonismo”. Specialan intereson vekis la demonstracioj de la ora metodo ĉe la junaj gepartoprenintoj el Tailfingen, kiuj ankaŭ bone kontribuis en la sukcesa Literatura Vespere, D-ro Mikaelo Schmidt prelegis pri „Aspektoj de unuiganta Eŭropo” kaj pri „Nia varbado”. Voldemaro von der Ley donis historian skizon pri niaj eminentuloj, kaj nia amiko Colnot el Nancio raportis precipe pri nuntempa kampanjo en Francujo por aperigi Esperanton en la (lernejaj) ekzamenaj programoj. Estas memkompreneble, ke la estraranoj de TEJO prelegis pri la Esperanto-junularo kaj diversaj aliaj junularaj problemoj kaj informis en multaj diskutoj pri la agado de nia organizo. La „Paska Leporo”, la gaja vespero, kelkaj ekskursoj kaj multaj kantoj ĝojigis ĉiujn gepartoprenintojn de la bela kunveno.

GÜNTHER BECKER,
prezidanto de TEJO.

VIGLIĜAS AGADO DE LA ESPERANTISTA JUNULARO EN MARIBOR (JUGOSLAVIO)

La 18-an de februaro ĉ.j. okazis fondĝeneralkunveno de memstarigita junulara sekcio. Tiam oni elektis prezidanton, vicprezidanton, sekretariinon, propagandiston kaj anon respondecan pri kulturo kaj klerigo. Okaze de ĝeneralkunveno de urba E-societo, la 10-an de marto ĉijare, la kunvenintoj decidis ankoraŭ plue vigle agadi kaj peni por kunlaboro kun aliaj junularaj sekcioj.

Nia celo estas interkonatiĝi ne nur kun enlanda sed ankaŭ kun eksterlanda junularo esperantista. Ĉiu kiu

havos okazon travojaĝi Mariboron estas invitata viziti nin kontribuante al interamikiĝo inter nacioj. Por ĉiuj informoj kaj deziroj turnu vin al: Junulara sekcio de E-societo, Partizanska 47/1, Maribor, Jugoslavio.

GOLOB IZIDOR

LABOR-KAMPO EN NEDERLANDO

(daŭrigo)

Kiel ni vidas, gejunuloj kun malpezaj poŝoj ofte sukcesas vojaĝi eĉ grandan distancon kaj partopreni la laborkampon dum unu aŭ du semajnoj, foje dum monatoj.

Service Civil International estas neŭtrala, kun interna ideo preskaŭ identa kun tiu de Esperanto. Krom tio ni ne forgesu, ke ĝi estas pioniro inter grupo de movadoj, en kiuj partoprenas pli ol cent mil gejunuloj ĉiujare (okdek mil en Hindujo).

En 1956 S.C.I. organizis 63 laborkamponojn en 16 landoj, plejparte en Okcidenta Eŭropo, kun kvar servadoj sinsekve en Hindujo.

Nun oni volas etendiĝi al la Orient-Eŭropaj landoj, por ke la junularo tutmonda interkonatiĝu; jam en 1955 kunlabore kun Tutmonda Federacio de la Demokrata Junularo oni starigis laborkampon en Warszawa, kaj en 1956 du senditoj de la Moskva junularo venis al laborkampo en Francujo.

Se la Esperantistaj gejunuloj venus amase en la laborkampoj, ili povus praktike labori por la alproksimiĝo de la popoloj kun la tuta energio kaj entuziasmo. Krom tio, ili ne nur vidus fremdajn landojn kaj amikiĝus kun ties popoloj, sed sin renkontus reciproke, praktikus Esperanton, fine lernus paroli en maniero malofte ebla en la klubo.

Siaparte la Esperanta movado povus kontribui per la organizado de laborkampoj, ĉar multe da samideanoj estas respondecaj, laboras en distrikto kiu ĵus suferis katastrofon, direktas infanhejmon kiu devus esti farbata. Atentu al la jenaj punktoj. La laboro devas esti vere utila al la socio. Normale oni provizas simplan nutraĵon kaj ŝirmejon por la gevolontuloj. La grupo prefere konsistu el ne malpli ol 6—10 aŭ pli ol dudek kvin samtempe. Se la tasko estas iom teknika, devas esti spertulo por ĝin direkti.

Por ĉia konsilo kaj por aliĝi oni sin turnu al:

Service Civil International, 77 Boulevard Jean Jaures, Clichy (Seine), Francujo.

THOMAS J. WOODALL

2-a INTERNACIA JUNULAR-RENKONTO AMIKA

„En servo por la homaro”

por gejunuloj de 18 ĝis 30 jaroj, okazonta de 2-9 ĝis 15-9-1957 en la svisa junulargastejo Rotschuo apud Gersau (Svisujo).

— **Oficialaj lingvoj:** franca, angla, germana, Esperanto.

— **Kostoj por partoprenantoj** (gastigado kaj manĝoj): 125 svisaj frankoj.

— **Diskutprogramo:** La junularo antaŭ la nuntempaj problemoj internaciaj:

- 1) Strebo al libereco
- 2) Kompreniĝo inter la popoloj
- 3) Energio el atomoj
- 4) Reformo de la nuntempa vivmaniero.

— **Promenoj kaj ekskursoj** al Lucerno, Lago de la Kvar Kantonoj, Axenstrasse, Rütli, Clevenalp Brisen, Furka-Grimmel-Brünig, Glaci-montaro.

— **Distriĝo:** Komunaj promenoj, amuzaj vesperoj, ludoj endome kaj eksterdome.

— **Generalaj celoj:** Okazigi pluajn amikajn renkontojn internaciajn; organizi ĉiulande grupojn de serv-pretemuloj; kunlabori kun ĉiuj organizaĵoj, kiuj metas sin aktive je servo de la homaro.

Aliĝu skribante al: Mme. FUCHS, B.P. 124 „Au Service de l'Homme”, MULHOUSE (Francujo), aŭ al: Jugendherberge Rotschue, bei GERSAU (Svisujo).

ALBERT LIENHARDT

KONSCIA ADMONO DE ADEPTO

La granda amiko de Esperanto, D-ro h.c. Theodor Körner, prezidinto de Aŭstrujo, eks-generalo, mortinta en Vieno la 4.1.1957 tuj post fino de sia antaŭtagmeza deĵoro en la oficejo, akompanis la eldonon de libro por gejunuloj „Hand in Hand ins Friedenland” („Harmonie en la landon de la paco”) per jenaj tre signifaj vortoj:

Karaj junaj geamikoj miaj! Ĉi tiu libro rakontas al vi pri la milito, por ke vi lernu malami ĝin kaj ami la pacon.

Kiel maljuna soldato, kiu kunagis kaj konas ĉiajn terurojn de la milito, mi diras al vi: Ne eblas laboro pli utila al la homaro ol la laboro por la paco. Ĝi ne venas donacate; ni devas ĝin voli, ĉiu unuope devas ĝin konfesi el tuta koro, sen kondiĉoj kaj kromintencoj.

Kiu estus vokata al ĉi tiu laboro pli ol la junularo, en kiu reprezentigas la estonteco, kaj kies interna sinteno estos decidiga por la formado al tiu estonteco? Vi klopodu, doni ekzemplon de reciproka komprenemo kaj por la firma volo al harmonio! Tiel vi povas jam hodiaŭ kunlabori en la estigo de nova mondo paca!

Peris Dr. A. HALBEDL

TABELA TRARIGARDO pri la INFORMA LABORO en 1956

Landa Asocio aŭ teritorio	Adreso de la Informa Fako	Numero de		Prelegoj		Radio- pre- legoj pri E.	Ekspozicioj		Disdonitaj afiŝoj, flugfolioj, broŝuroj	Ĉu la interesiĝo pri Esp. kreskis?
		arti- koloj	infor- moj	Nom- bro	Ĉeest- intoj		Nom- bro	Ĉeest- intoj		
Argentina	C. Bongiovanni, Los Cisnes, Provincia de Cordoba	6	116	2	160	204	2	30.000	3.200	Multe kreskis
Belga (Franc- lingva parto)	Esperanto-Office, 18 rue de Franquenes, Ottignies (Bra- bant)	313	200	—	—	—	—	—	201.050	Sama
Belga Kongo	Sama kiel por Belgujo	1	50	—	—	—	—	—	30	Komenciĝis
Brazila	Prof. D-ro Carlos Domingues, Rua Alvaro Alvim 27, Rio de Janeiro	3.000	3.000	95	7.000	400	—	—	54.000	Kreskis
Brita	B.E.A. 140 Holland Park Ave- nue, London, W. 11	30	465	100	1.500	—	6	10.000	10.000	Sendube kreskis
Bulgara	Nikolaj Nikolov, Poŝtkesto 44, Sofia	59	27	83	5.000	178	6	7.000	50.000	Kreskegis
Ĉeĥoslovaka	M. Rudolf, Wanklova 14, Olomouc	31	216	22	1.412	—	3	5.000	6.100	Tre kreskis
Ĉina	Ĉina Esperanto-Ligo, P.O. Kesto 77, Peking	4	4	4	400	—	—	—	—	Ege kreskis
Dana	O. C. Lange, Giesegaardsvej 33, København-Valby	1.170	—	—	—	12	5	2.000	7.500	Multe kreskis
Finna	P. Kinosmaa, Apollonkatu 1.C.28, Helsinki	20	54	5	200	2	3	5.300	2.300	Iom kreskis
Franca	I.E.F., 34 Rue de Chabrol, Paris X	766	—	25	820	166	59	6.000	9.500	Kreskis
Germana	EGS, M. Schumacher, Fehrbel- linerstr. 5, Köln-Weidenpesch	501	353	—	—	—	—	—	2.100	—
Saarlanda	—	42	10	—	—	1	1	35	50	—
Greka	Fino H. Polimeropulu, Likurgu 163, Kallitheo, Athine	8	15	1	50	—	—	—	—	Nekonate
Hispana	D-ro R. Herrero, Calvo Sotelo 11, Valencia	72	500	10	1.000	156	5	500	4.000	Kreskis
Hungara	M. Lajos, Bors-u. 2, Budapest XII	28	48	—	—	1	7	5.000	5.000	Multege kreskis
Islanda	Federacio de Islandaj Esperan- tistoj. Pósthólf 1081, Reykjavik	4	—	—	—	—	—	—	—	Iom kreskis
Itala	Informa Oficejo de I.E.F., cas. postale 248, Torino	200	703	150	25.200	80	23	13.600	22.200	Tre kreskis
Japana	Japana Esperanto-Instituto, Tokio, Hongo, Motomati 1-13	30	100	20	2.000	13	31	30.000	13.500	Rimarkinde kreskis
Jugoslavia	Esperanto-Centro, Poŝtfako 275, Ljubljana	340	430	70	6.000	130	30	16.000	18.000	Sendube kreskis
Kanada	W. D. B. Hackett, 362 Soudan Ave, Toronto	20	15	5	150	2	—	—	700	Iom kreskas
Luksemburga	Sama kiel por Belgujo	2	—	—	—	—	—	—	40	Komenciĝis

TABELA TRARIGARDO pri la INFORMA LABORO en 1956

Landa Asocio aŭ teritorio	Adreso de la Informa Fako	Nombro de		Prelegoj		Radio- pre- legoj pri E.	Ekspozicioj		Disdonitaj afiŝoj, flugfolioj, broŝuroj	Ĉu la interesiĝo pri Esp kreskis?
		arti- koloj	infor- moj	Nom- bro	Ĉeest- intoj		Nom- bro	Ĉees- tintoj		
Maroka	Maroka Esperanto-Asocio, 10 Rue de Gascogne, Meknès	40	—	3	370	—	—	—	—	Kreskis
Meksika	Alicia Zepeda, Altamirano 75-1, México, 4, D.F. México	15	6	5	500	—	—	—	—	Iomete kreskis
Nederlanda	Provizore LEEN, P. C. Hoof- straat 90, Amsterdam	127	86	30	1.200	260	10	1.000	14.000	Iom post iom kreskis
Norvega	L. Anjer, Oberst Rodesvei 76, Oslo-Nordstrandhøgda	50	600	6	115	2	1	—	3.000	Senŝanĝa
Pollanda	Isaj Dratwer, Varsovio 10, Skrytka 108	109	196	40	2.000	82	5	2.500	6.400	Tre kreskis
Sveda	S.E.F. Tegelbacken, Stockholm	85	872	242	18.000	2	3	95.000	25.500	Kreskis
Svisa	Provizore la adreso de SES	68	—	4	120	208	2	500	2.200	Kreskis
Urugvaja	Rubens A. Barbieri, Sierra 2140, Montevideo	30	25	3	400	25	2	20.000	2.600	Kresketis
Venezuela	Venezuela Esperanto-Asocio, Apartado del Este 4885, Cara- cas	12	100	—	—	—	20	—	—	Iom kreskis
31 respondoj	ENTUTE	7.178	8.191	925	73.597	1.924	224	249.435	462.970	Ĝenerale tre kreskis
21 respondoj	Komparaj ciferoj por la j. 1955	3.293	8.669	621	32.500	857	60	70.200	108.176	Kreskis

ALDONO AL TABELA TRARIGARDO PRI INFORMADO

Post kiam la tabela trarigardo pri la informa laboro en 1956 estis jam kompostita, alvenis kelkaj novaj informoj. S-ro Tibor Sekelj informis, ke en Hindujo aperis 6 artikoloj, 8 informoj kaj ke okazis 3 prelegoj kun 110 ĉeestintoj. La Itala Informa Fako sciigis, ke en 1956 aperis pliaj 13 artikoloj kaj 2 informoj. Fine, la Rondo Esperantista ĉe la Granda Soveta Enciklopedio en Moskvo sciigis, ke en 1956 aperis en la soveta gazetaro entute 104 artikoloj pri Esperanto. Sekve, entute venis 33 respondoj. La resumaj ciferoj estas: 7.301 artikoloj, 8.201 informoj, 928 prelegoj kun 73.707 ĉeestintoj. La aliaj ciferoj restas senŝanĝaj.

Nova granda progreso de informado pri Esperanto

En la kadro de la Baza Laborprogramo de U.E.A. (vidu Jarlibron 1956, II Parto) la informado okupas elstaran lokon. De intensa kaj bona informado dependas la kvanto kaj kvalito de la estontaj lernantoj kaj, sekve, la aspekto kaj socia graveco de la tuta Movado. Tial U.E.A. kaj la granda plimulto de la landaj asocioj kaj lokaj grupoj dediĉas specialan kaj ĉiam pli grandan atenton al informado, ne neglektante, kompreneble, la du aliajn ĉefajn branĉojn, nome la instruadon de la lingvo kaj la praktikajn aplikojn en la plej larĝa senco de tiu vorto.

En tiu ĉi numero de la revuo estas publikigita tabelo kun resumaj ciferoj pri la informa laboro, farita en la jaro 1956. Eĉ tre supra legado montras, ke en tiu jaro la intenseco de la informado plejparte duobliĝis kompare kun la jaro 1955, dum

koncerne la nombron de prelegoj kaj la nombron de propagandiloj eĉ kvarobliĝis. Tiu brila sukceso estas rezulto de pluraj faktoroj, sed unuavice de bona organizo; de firma kunligo inter la Informa Fako de U.E.A., unuflanke, kaj la I.F. de la landaj asocioj kaj unuopaj kunlaborantoj, aliflanke; de harmonia agado en la tuta mondo surbaze de kelkaj fundamentaj principoj kaj gvidlinioj, komune akceptitaj.

La rolo de U.E.A.

La I.F. de U.E.A., kiu funkcias jam plurajn jarojn (kun mallonga interrompo en 1955), daŭre klopodis plibonigi kaj organize plifortigi la informadon. Tiucele ĝi dissendis grandan nombron da cirkuleroj kun detalaj konsiloj pri la metodoj, karaktero kaj enhavo de la agado sur la kampo de informado. Tiucele estis organizitaj ankaŭ pluraj

kunvenoj de la reprezentantoj de diversaj landaj Informaj Fakoj, el kiuj la lasta okazis en Frostavallen la 30-an de julio 1956. Tiu kunveno, kiun ĉeestis 80 personoj el 15 landoj, akceptis 23 tezojn sub la komuna titolo „Bazaj Principoj de Informado pri Esperanto” (vidu la revuon „Esperanto”, decembro 1956, p. 178—179). La plurjara interŝanĝo de pensoj pri la temo ricevis tiamaniere koncizan kaj konkretan rezulton, kiu fariĝis elirpunkto por la plua laboro. La tezaro sendube tre helpis al ĝenerala altigo de la nivelo de la informado pri Esperanto.

La I.F. de U.E.A. troviĝas en rekta kontakto kun ĉiuj landaj asocioj kaj kun iliaj I.F., kiel ankaŭ kun 84 rektaj kunlaborantoj el 32 landoj. Ankaŭ en la pasinta jaro la I.F. de U.E.A. regule eldonadis la Bultenon de la Internacia Gazetara Servo (I.G.S.) kun multaj informoj pri la Internacia Lingvo kaj sendis ĝin al ĉiuj landaj asocioj kaj kunlaborantoj. En tiu-ĉi jaro komencis aperadi ankaŭ la angla-franca eldono de la Bulteno, kaj tiu-ĉi eldono estas sendata al 200 gazetoj kaj revuoj en landoj sen Esperanto-Movado. U.E.A. eldonis la 6-lingvan flugfolion en 40.000 ekzempleroj. La dua eldono estas publikigita en 60.000 ekzempleroj. La ekspedicio de Lic. Tibor Sekelj faris kaj faras bonegan laboron ankaŭ rilate informadon en pluraj landoj de Azio. Kelkaj gazetaraj konferencoj, organizitaj de U.E.A., pluraj prelegvojaĝoj (ekzemple Potts, Doneis k.a.), ankaŭ konsiderinde kontribuis al disvastigo kaj diskonigo de la lingvo. Apartan mencion meritas la Kongresa Gazetara Servo, gvidata nun de s-ro G. C. Fighiera kiel speciala branĉo de la I.F. de U.E.A., kiu sukcesis aperigi centojn da artikoloj kaj informoj ne nur en la kongresa lando, sed ankaŭ en aliaj regionoj. En diversaj okazoj la I.F. de U.E.A. liveris al la landaj asocioj kaj kunlaborantoj jam pretajn artikolojn kaj prelegojn. Kvankam CED ne okupiĝas rekte pri informado, tamen la dokumentoj kiujn ĝi daŭre sendas al gravaj internaciaj organizaĵoj, institutoj kaj institucioj, sendube multe kontribuas al korekta informado de tiuj specialaj medioj pri la Internacia Lingvo.

Studante la rezultojn entenitajn en la tabelo oni konsideru, ke parto de la rekta laboro de U.E.A. (ekzemple la liveritaj artikoloj kaj informoj) troviĝas en la publikigitaj ciferoj, sed ke alia parto (ekzemple la 6-lingva flugfolio aŭ la dokumentoj de CED) ne estas registrita.

Kelkaj komentoj pri la tabelo

La tabelo estas farita surbaze de la informoj ricevitaj en la I.F. de U.E.A. ĝis la 15-a de majo 1957. Kvankam en tiu-ĉi jaro alvenis 10 respondoj pli ol en 1955, tamen pluraj ne resendis la plenigitan demandaron. Estas vere bedaŭrinde, ke kelkaj landaj asocioj kaj kunlaborantoj ankoraŭ ne komprenas la gravecon de raportado, eĉ se ili faris tre malmulte. Ankaŭ negativaj informoj helpas al kompletigo de la bildo pri la informa laboro. La publi-

gigitaj ciferoj devas esti konsiderataj kiel minimumaj. Temas pri informoj, kolektitaj de la landaj I.F. aŭ kunlaborantoj, pri kiuj oni havis nepre certan scion. Estas tute klare, ke ankaŭ aliaj laboroj rilate informadon estis faritaj ne nur en la landoj, kiuj ne sendis raporton, sed ankaŭ en tiuj, kiuj ĝin sendis.

Jen nun kelkaj tute mallongaj komentoj pri la unuopaj rubrikoj:

Artikoloj kaj informoj: Temas, kompreneble, pri nacilingvaj artikoloj kaj informoj, aperintaj en la revuoj kaj gazetoj. Speciala enketo montris, ke el ĉiuj artikoloj kaj informoj pri Esperanto, 95 % ĝis 100 %, depende de la landoj, estas favoraj al Esperanto.

Prelegoj: En tiu rubriko estas menciitaj ĉiuj nacilingvaj prelegoj pri Esperanto, faritaj por la larĝa publiko, aŭ en difinitaj medioj, ekzemple en universitatoj, diversaj kulturaj societoj k.s. La nombro de ĉeestintoj estas proksimuma.

Radio-prelegoj: Estas enkalkulitaj la nacilingvaj prelegoj aŭ prelegetoj pri Esperanto, sed ne la Esperantlingvaj elsendoj. Kompreneble, ankaŭ la 1.428 Esperantlingvaj radio-elsendoj en 1956 havis grandan valoron por diskonigo de la lingvo. En tiu-ĉi rubriko estas enkalkulitaj ankaŭ la televidaj intervjuoj, kiuj okazis en kelkaj landoj (ekzemple Italujo).

Ekspozicioj: Temas pri veraj ekspozicioj, organizitaj en specialaj ejoj kaj anoncigitaj kiel tiaj. Ne estas enkalkulitaj la montrofenestroj kun Esperantajoj. La nombro de ĉeestintoj estas proksimuma.

Afiŝoj, flugfolioj, broŝuroj: En la ciferoj estas enkalkulitaj ĉiuj kategorioj de tiaspecaj propagandiloj, sed estas necese menci, ke la nombro de afiŝoj en ĉiuj landoj estas relative tre malgranda.

Aliaj laboroj de la Informaj Fakoj

Pluraj landaj asocioj kaj informaj fakoj aplikis ankaŭ aliajn metodojn de informado. Estas utile konigi tiun ilian laboron ne nur tial, ĉar ĝi estas objektive grava por la disvastigo de la lingvo, sed ankaŭ tial, ĉar eble la samaj metodoj povus esti aplikataj ankaŭ en aliaj landoj. La ĉefaj el tiuj metodoj estas:

Nacilingva informa bulteno: Pluraj landaj I.F. eldonis aŭ specialajn numerojn de sia organo en la nacia lingvo, aŭ daŭre eldonas specialan nacilingvan bultenon kun informoj pri Esperanto (bulgara, finnlanda, franca, hungara, itala, nederlanda, jugoslaviana k.a.).

Pagitaj reklamoj kaj anoncoj: Brita Esperantista Asocio faris grandskalan reklamon en gazetoj kun eldonkvanto de entute 4½ milionoj kaj elspezis por tiu celo 800 pundojn. La metodo de pagitaj reklamoj kaj anoncoj estas aplikata ankaŭ en aliaj landoj, ekzemple en Danlando, Finnlando kaj Urugvajo.

Montrofenestroj: Montrofenestrojn aŭ montrokestojn kun Esperantajoj havas Bulgarujo, Jugoslavio, Maroko, Pollando. Tiuj montrofenestroj aŭ

montrokestoj troviĝas en elstaraj lokoj de trafikaj stratoj.

Murgazetoj: Metodo aplikata en Bulgarujo kaj Jugoslavio, precipe en fabrikoj, entreprenoj, oficejoj, kulturaj societoj.

Film prezentadoj: La itala I.F. raportis, ke en 1956 pli ol 14.000 personoj rigardis en Italujo la Esperantan filmon pri Nederlando kaj ke tiu prezentado havis eksterordinaran sukceson. La filmo estis prezentita ĉefe al gestudentoj kaj profesiaj ĝeinstruistoj. En Italujo oni ankaŭ prezentis teatraĵojn en Esperanto kaj invitis neesperantistan publikon. Montriĝis, ke ankaŭ tiu metodo donas tre bonajn rezultojn.

Loterio: En Svedlando kaj Jugoslavio estis organizitaj loterioj. La granda loterio, organizita en tuta Jugoslavio, donis ne nur enspezon de pluraj milionoj da dinaroj, sed ankaŭ havis eksterordinaran signifon por diskonigo de la lingvo. Pro la reklamoj en gazetoj en kunligo kun la loterio, pro la specialaj flugfolioj kaj pro la fakto ke ĉiu bileto havis en la teksto la vorton „Esperanto”, centmiloj da personoj nur laŭ tiu vojo aŭdis pri Esperanto.

Grava plibonigo de la informado estas atingita ankaŭ tial, ĉar ĉiam pli kaj pli la informado direktiĝas ne nur al ĝenerala publiko, sed ankaŭ al specialaj medioj. Agante laŭ la sugestoj de la kunveno en Frostavallen kaj de la kongreso en Kopenhago, preskaŭ ĉiuj landaj I.F. dediĉis apartan atenton al la junularo. Pluraj landaj asocioj speciale atentis la ĝelernantojn, gestudentojn kaj ĝenerale la intelek-

tulajn mediojn (Brazilo, Bulgarujo, Danlando, Francujo, Japanujo, Jugoslavio k.a.) Bonan informan laboron en la ĝeinstruistaj medioj faris Danlando kaj Jugoslavio.

Analizaj rimarkoj

Kvankam sendube estas farita vere grandega progreso en la pasinta jaro, tamen estas rimarkeblaj kelkaj mankoj. Pluraj landaj asocioj tute ne havas informan Fakon, nek dediĉas al la informado ne necesan atenton. Aliaj landaj asocioj ankoraŭ ne havas plene evoluintan Informan Fakon, kiu prizorgus ne nur informadon per artikoloj, sed ankaŭ organizus prelegojn, aranĝus ekspoziciojn, atentus la informadon per afiŝoj, flugfolioj, broŝuroj k.s. Montriĝis kun plena certeco, ke efikajn rezultojn donas nur tiu informado, kiu paralele aplikas ĉiujn metodojn, kiu havas konstantecon kaj kiu organizas specialajn grandajn kampanjojn en diversaj okazoj. Estus tre utile, ke ĉiuj, kiuj laboras sur la kampo de informado, daŭre havu sur sia skribotablo la „Bazajn principojn de Informado pri Esperanto”, kiujn rekomendis la kunveno en Frostavallen. Tio certe helpus ankaŭ al plua plibonigo de la kvalito.

En Informa Fako de U.E.A. esprimas dankon kaj gratulon al ĉiuj landaj asocioj kaj al ĉiuj kunlaborantoj de U.E.A. kaj de la landaj Informaj Fakoj, kiuj kontribuis al la brilaj atingoj de 1956 kaj kiuj daŭre dediĉas siajn fortojn kaj talentojn al la plua progresigo kaj disvastigo de la Internacia Lingvo.

I. L.

Gvidiloj, Varbiloj kaj Prospektoj en Esperanto

Dum la lastaj jaroj multaj urboj respektive Trafikoficejoj eldonis novajn prospektojn aŭ tute en Esperanto aŭ almenaŭ kun aldonoj en nia lingvo. Tre ĝojiga afero, ĉar per tio Esperanto estas praktike aplikata! Sed permesu, ke mi publikigu pri tio kelkajn spertojn kiuj rilatas al la ĝesamideanaro tutmonda.

En la jaro 1952 la Urba Trafikoficejo de mia gepatra urbo Bingen apud la Rejno eldonis novajn ilustritajn gvidilojn kun germanlingva teksto kaj aldonoj en angla kaj franca lingvoj. Mi konvinkigis la estron pri la valoro de esperantlingva aldono kaj mi sukcesis. Oni ankaŭ presigis tian aldondon kaj en E-gazetaro aperis notoj pri tio kaj multaj esperantistoj petskribis pri la varbiloj.

Komence de ĉi tiu jaro oni eldonis novajn, pli belajn prospektojn kun trilingva subskribo sub la belegaj kolorbildoj, nome: germane, angle kaj france; krom tio la teksto estas en germana kaj angla lingvoj kaj oni presigis ankaŭ aldonojn en franca, nederlanda kaj sveda lingvoj. Mi parolis kun la estro de la trafikoficejo, ĉu li ne volas ankaŭ eldoni esperantlingvan aldondon kaj li respondis al mi, ke la stoko de la eldono de 1952 estas ankoraŭ sufiĉe granda, krome la presisto devus aĉeti la preslitojn kun supersignoj, ĉar li ne posedas tiajn tipojn kaj tiam la afero fariĝus ankaŭ tro multekosta. La duan argumenton mi kontraŭ-

batalis per tio, ke mi rekomendis al li presejon kiuj havas la tipojn kun supersigno.

Do feruloj, vojaĝemuloj, libertempuloj kaj kongrespartoprenontoj, kiuj preterpasos survoje al la kongreslokoj la urbon Bingen, petu prospektojn en Esperanto, sed el turistaj motivoj, (nepre necesa!) rekte de: Urba Trafikoficejo, Bingen (Rejno), Germanujo aŭ laŭ la adreso de la anonco en la jarlibro de UEA, paĝo 179. — Ju pli multaj alskriboj, des pli granda la efiko! Kaj se eble vizitu la vin-urbeton Bingen apud la Rejno, vi certe ne pentos esti restinta tie.

FoLo.

INFORMOJ EL RUMANIO

● La Iniciata Komitato por Esperanto de R. P. Rumana (adreso: Poŝtkesto 205, Bukureŝto, R. P. Rumana) dankas al ĉiuj frataj kaj samcelanaj organizoj, kiuj reprenis la informilon pri la estiĝo de la komitato kaj por la kuraĝigaj leteroj kaj proponoj por apogo de la rumana esperantista movado.

● La bukareŝtaj ĝesperantistoj kunvenadas komence de la monato januaro 1957 ĉiun merkredon inter la horoj 19—22 en la klubejo de la Sindikato de la Klerigaj Laborantoj, en Bukureŝto, Bulev. 6 Marto, nro. 32.

● Dum la monato marto ekfunkciis

en Bukureŝto jenaj kursoj por komecantoj: S-ano I. Petrin gvidas kurson kun 50 lernantoj en la supermenciita klubo; S-ano Prof. A. Boia gvidas du kursojn kun 70 lernantoj de la Stata Teknika lernejo por Stenodaktilografio.

● Dum la monato februaro 1957 en la kadro de la Blindula Asocio en R. P. Rumana, la grupo de malnovaj esperantistoj nevidantoj fondis esperantistan sekcion. S-ano George Konstantin komecencis tie ĉi kurson kun 12 nevidantoj.

● Ĝis nun ankaŭ en aliaj 10 urboj de la lando la esperantista movado revigliĝis. En la urbo Oradea, S-ano Edmondo Vincze gvidas kurson kun 20 komecantoj. En la urbo Odorhei (Autonoma Regiono Magiara) S-ano Jozefo Teleki gvidas kurson kun 50 lernantoj.

● La Instituto por Lingvoscienco de R. P. Rumana debatis la problemon de la utileco de la lingvo Esperanto kaj respondis skribe al la Iniciata Komitato, la 13-an de marto 1957, ke la Konsilantaro de la Instituto unuanime rekonas la utilecon de la disvastigo de la lingvo Esperanto kaj ĝian estiĝon kiel internacia interkomprenilo. Samtempe la Fako por Lingvoscienco kaj Literaturo de la Akademio de R. P. Rumana skribe nin sciigis ke la Faka Plenkunsido konkludis pri la utileco de la lingvo Esperanto.

Ambaŭ plej gravaj sciencaj institucioj el nia lando rekomendas la apogon de la agado de la Iniciata Komitato por Esperanto de R. P. Rumana.

CED

Centro de Esploro
kaj Dokumentado

77, Grasmere Avenue, WEMBLEY, Middlesex, Anglujo.
Telefono ARNold 90-81

ALVOKO AL RADIO-AŬSKULTANTOJ

CED ellaboris statistikon de radio-elsendoj en Esperanto dum la postmilitaj jaroj. Resumo de la tabeloj aperis en la maja numero de nia organo (p. 39). Antaŭ la milito estis faritaj similaj statistikoj. CED deziras kunligi ĉiujn informojn kaj tiamaniere kunmeti gravan dokumenton pri ĉiuj radio-elsendoj en la Internacia Lingvo. Nun la kunlaboranto de CED, s-ro G. Larglantier, ellaboris statistikon por la jaro 1939 (entute 1.234 elsendoj), sed mankas informoj por la jaroj 1940 ĝis 1944. Tial CED petas ĉiujn, kiuj povas doni pri tio precizajn informojn, komuniki ilin al s-ro G. Larglantier.

La ĉefaj demandoj estas:

1. Ĝis kiu dato regule elsendis en Esperanto la radio-stacioj Roma, Hilversum, Budapeŝt, Kortrijk, Tallinn, Kanas, Rio de Janeiro, Rosario, kiuj havis programon en Esperanto ankoraŭ en aprilo 1940?

2. Je kiu dato komenciĝis la regulaj elsendoj en Esperanto de la stacioj Shepparton (Aŭstralio), Kortrijk, Sofia, Praha, Ostrava, Warszawa, Racine (Usono), Rio de Janeiro, kiuj havis programojn en Esperanto en aprilo 1945?

3. Kiuj aliaj stacioj uzis Esperanton inter 1940 ĝis 1945? Laŭ nia scio, Sofia, Tallinn, Budapeŝt, Roma, daŭre elsendis komence de 1941, dum Rosario almenaŭ ĝis 1942.

Daŭro kaj ofteco de la programoj estas utilaj sciigoj.

CED anticipe dankas por ĉiuj informoj sendotaj al: S-ro Georges Larglantier, 29, Brd. Murat, Paris, XVI (Francujo).

DU NOVAJ GRAVAJ DOKUMENTOJ

En la serio „Documenta”, eldonata de la Ministerio de Informado kaj Turismo de Hispanujo, aperis sub la numero 1431 la 27-an de decembro 1956 grava dokumento pri Esperanto. Ĝi havas 19 presitajn paĝojn kaj objekte prezentas la strukturon de la lingvo, la bazajn principojn de la Esperanto-Movado, la Esperantan literaturon, gazeton kaj revuojn, Internacian Someran Universitaton, fakvortarojn, aplikon en la radio, komerco, turismo ktp. La dokumento estas bazita sur la dokumento CED/4, kiun eldonis CED okaze de la Konferenco de UNESKO en Montevideo.

La Itala Esperanto-Federacio eldonis luksan, bele ilustritan broŝuron sub la titolo „Le lingue dividono... L'Esperanto unisce!” (La lingvoj dividas, Esperanto kunligas). Ankaŭ tiu ĉi broŝuro estas bazita sur informoj, ĉerpitaj el diversaj dokumentoj de CED.

JUBILEA VERKARO DEDIĈITA AL PROF. D-RO SEIHO NISHI

La eminenta kunlaboranto de CED, Prof. D-ro Seiho Nishi, rektoro de la Gunma Universitato (Japanujo) festis antaŭ nelonge sian 70-an naskiĝtagon. Tiuokaze la Departamento de Anatomio de la Universitato en Tokio eldonis luksan 620-paĝan sciencajn verkon sub la titolo (en Esperanto) „Jubilea Verkaro dediĉita al D-ro S. Nishi”. La verko enhavas sciencajn kontribuojn de la kolegoj kaj lernintoj de la jubileanto. La studoj estas verkitaj en la lingvo Esperanto, angla, germana kaj franca. En la Internacia Lingvo estas verkitaj la studoj de M. Suzuki, T. Nakayama, T. Sugihara, H. Outi, R. Ura. Ankaŭ la antaŭparolo estas verkitaj en Esperanto.

Al sia kunlaboranto CED ankaŭ ĉi-maniere esprimas siajn gratulojn kaj bondezirojn.

UNESKO ELDONAS FOTOAFIŜOJN KUN TEKSTO EN ESPERANTO

La Sekretariato de UNESKO decidis eldoni plurajn seriojn de foto-afiŝoj kun tekstoj en Esperanto. La afiŝoj aperis fine de junio. UNESKO senpage disponigas kompletan de 18 afiŝoj. Oni povas mendi ĝin ĉe UEA, Eendrachtsweg 7, Rotterdam. Por kovri la efektivaĵojn de UEA oni pagas 1 gld por 1 kompleto. La landaj asocioj kaj lokaj grupoj estas petataj tuj mendi almenaŭ unu kompletan serion kaj nepre elmontri ĝin en siaj ejoj kaj, laŭ la ebleco, ankaŭ publike. Mendu tuj, ĉar la kvanto estas limigita.

La Esperantan tradukon prizorgis CED.

1000-a DOKUMENTO DE CED

En majo ĉi-jara estis registrita en la oficejo de CED la 1000-a dokumento. Kiel konate, CED kolektas ĉiujn gravajn dokumentojn rilate Esperanton kaj ĝenerale la problemon de komuna lingvo en la internaciaj rilatoj. Surbaze de tiuj dokumentoj CED eldonas sian propran dokumentaron, kiu estas sendata al la plej gravaj internaciaj organizaĵoj, sciencaj institutoj kaj institucioj.

LA FINANCA SITUACIO

CED plenumas grandegan kaj vere gravan laboron. Sen ĝia laboro ne estus imagebla la rezulto atingita en Montevideo, nek la sukcesoj en multaj aliaj okazoj kaj medioj. Ĝi laboras per minimumaj financaj rimedoj, kiujn havigas parte UEA kaj parte donace kelkaj Esperanto-organizaĵoj kaj kelkaj — vere nur kelkaj — unuopaj esperantistoj. Sube ni publikigas la liston de donacintoj en tiu-ĉi jaro. Ĝi estas tiel mallonga kaj tial la sumo de la donacoj tiel malgranda, ke la tuta laboro de CED estas serioze endanĝerigita. Tial ĉiuj esperantistoj kaj ĉiuj Esperanto-organizaĵoj estas plej insiste petataj kontribui por la celoj de CED. En 5 jaroj de sia ekzistado CED ricevis financon helpon de ne pli ol 50 Esperanto-organizaĵoj kaj unuopuloj! Se ĉiu el la 25 mil membroj de UEA oferus por CED nur la sumon de 10 ŝilingoj aŭ egalvaloron, CED povus trankvile labori dum pluraj sekvantaj jaroj! Tiu, kiuj komprenas la gravecon de CED bonvolu pripensi tiun fakton kaj ekagi konforme.

DONACOJ al CED

	\$	ŝ	p
S-ro Michael Coleman, Portugalujo	1—	0—	0
S-ino M. Carlsson		5—	3
S-ro P. Angerer, Aŭstrujo		5—	7
Novzelanda Esperanto-Asocio, Novzelando ...	5—	0—	0
S-ro L. Jolliet, Germanujo		5—	3
S-ro B. Reich, Usono	1—	15—	8
S-ro E. Maasbommel, Nederlando		18—	9
S-ino A. Duncan, Aŭstralujo	1—	0—	0
Gesinjoroj Holmes, Britujo	9—	0—	0
F-ino N. Hanson, Britujo		10—	0
S-ro W. H. King, Novzelando		16—	4
S-ro H. Groendijk, Nederlando		4—	8
Svisa Esperanto-Societo, Svislando	11—	8—	6
Stato je la 15-a de majo 1957	32—	10—	—

Al ĉiuj donacintoj plej koran dankon. Donacojn por CED oni povas sendi al UEA, 7, Eendrachtsweg, Rotterdam-C., Nederlando; al Unuiĝo Esperantista Franca, 34, Rue de Chabrol, Paris, X, Francujo; al ĉefdelegitoj de UEA aŭ al CED rekte je la nomo kaj adreso de ĝia direktoro, 77, Grasmere Avenue, WEMBLEY, Middlesex, Britujo.

La Kampanjo de la jaro:

Ĉiu kunlaboru en la varbado de apogantoj!

KORESPONDA SERVO MONDSKALA

Oficiala servo de UEA

Kiel vi povis legi en la Maja numero (p. 73), la Estraro de UEA dum sia paska kunsido oficialigis mian Korespondan Servon Mondskalan. Sekve de tiu decido, vi trovos ĉiunonate en „Esperanto” artikolon pri la K.S.M., per kiu mi konsilos vin, gvidante vian elekton laŭ la eblecoj, t.e. laŭ la landoj el kiuj mi efektive estos ricevinta disponeblajn adresojn de korespondantoj. Tiel vi ne riskos vane atendi respondon post neplenumbla peto. Mi esprimas al la Estraro de UEA kaj al S-ro Auld, Redaktoro de „Esperanto”, tutkoran dankon pro tiu disponigo de nia oficiala organo, kiu — de nun — ebligas pli rektan kontakton inter ĉiuj koresponddezirantaj legantoj kaj mi, kiel prizorganto de la K.S.M., el kio rezultos pli glata funkciado kaj pli rapida servado.

Al ĉiu peto plenumbla, mi kiel eble plej baldaŭ respondas per poŝtkarto. Tiu povas enteni maksimume kvin adresojn. Sed mi devas postuli unu respondkuponon por ĉiu petata korespondadreso ĉar plej ofte mi ne povas sendi unufoje ĉiujn deziritajn adresojn, Krom la lando, necesas zorgi pri la aĝo kaj pri la propraj deziroj de la eventuala korespondanto. Ekzemple: norvego petas adreson de brazilano; tian adreson mi havas, sed de sinjoro, kiu volas korespondi nur kun anglo... Tiaj estas la ĉiutagaj problemoj de la K.S.M., kies solvojn oni ofte devas atendi. Kun pluraj respondkuponoj, mi povas sendi unue la disponeblajn adresojn, poste la aliajn, kiam alvenas iuj konformaj al la aliaj, momente neplenumblaj petoj. Kun nur unu respondkuponon, vi devos atendi ĝis ĉiuj viaj petoj estos plenumblaj, kaj tio povos daŭri longajn monatojn. Personoj, kiuj sendas nenian respondkuponon (ekz. anoj de popoldemokratiaj landoj, kie tiuj ne ekzistas) povas nur disponigi sian adreson al la Servo, sed ne atendu iun respondon de mi mem, kaj ili ne estu tro postulemaj. Cetere, el kiu ajn lando, simpla disponigo, de sia propra adreso estas kompreneble senpaga. Ĉiu skribanta persono, ĉu petanto, ĉu adresdisponiganto, nepre indiku pri si mem informojn pri aĝo, sekso, profesio, ktp.

Nun, kiam aperas tiuj ĉi linioj, mi estas libertempe en Hispanujo, kie mi restos ĝis la 15-a de septembro. De tiu provizora adreso mi do prizorgas dum du monatoj (10 jul.—15 sept.) la K.S.M. Bonvolu sendi dum tiu tempo ĉiujn petojn al mi laŭ la jena (provizora) adreso:

DANIEL LUEZ
str. José Antonio 28
Alberique (Valencia)
Hispanujo

RADIO

Ĉiuj informojn pri radio sendu al S-ro G. Larglantier, 29 Bd. Murat, PARIS 16, Francujo.

En la tabelo horoj de la dissendoj estas laŭ la horsistemo de Greenwich. Por Mez-Eŭropa tempo oni aldonu unu horon.
Mallongigoj: I = Informoj, P = Parolado, K = Kurso.

Dimanĉo	10.17—10.30	Rio de Janeiro, 30.78m, 25.48m. K.I., L.B.V., Av. Rio Branco 43-3 ^o -Rio de Janeiro (D.F.) Brazilo.
	14.00-14.15	Piraçununga, 198m. K. Rádio-Difusora ZYI 3, Piraçununga (Sao Paulo), Brazilo.
	19.00—19.25	Sofia, 49.42m, 39.11m. P. Radio Sofia, Bulgarujo.
	22.30—22.55 23.20-23.35	Sofia, 39.11m, 30.93m. P. Bilbao. 265m. P. Radio Bilbao, Hispanujo. (Horo variebla dum unuhora diverslingva programo.)
Lundo	17.30—17.35	Bern, 48.66m, 31.46m, 16.87m, 13.94 m. P. (D-ro Baur.) SRG., Kurzwelldienst, Neuengasse 23, Bern, Svislando.
	18.10—18.30	Valencia, 233m, P. La Voz de Levante, Valencia, Hispanujo.
	22.40-22.57	Hilversum, 298m, 188m. P. N.C.R.V., Schuttersweg 8, Hilversum, Nederlando (nur la unuan lundon de ĉiu monato).
	Mardo	00.45-01.00
11.55-12.00		Bern, 48.66m, 31.46m, 13.94m, 11.70m. P. (D-ro Baur).
15.00-15.10		Ljubljana. 327m, 221m. K. Radio Ljubljana, Jugoslavujo.
17.55-18.10		Roma. 50.34m, 41.24m, 30.90m. P. Radio Roma, Casella Postale 320, Roma, Italujo.
Merkredo	19.00-19.15	Stockholm, 33.60m., 26.50m., 19.90m. P. Radio I.B.R.A., Esperanto programo. Poŝtfako 822, Stockholm 1, Svedujo (nur la lastan mardon de ĉiu monato).
	17.55-18.10	Roma. Kiel marde.
	21.55-22.05	Wien. 208m, 48.74m, 25.46m. I. Radio Wien, Argentinierstr. 30a, Wien IV, Aŭstrujo.
	22.50-23.00	Hilversum, 402m, I. V.A.R.A., Heuvellaan 33, Hilversum.
Ĵaŭdo	08.30-08.45	Paris. 348m, 249m. K. Esperanto-Office, Orléans (Loiret), Francujo.
	11.55-12.00	Bern. Kiel marde P. (D-ro Privat.)
	22.45-23.00	Zagreb. 264m. I. Radio-Zagreb, Jugoslavujo.
	23.30-24.00	Sao Paulo, 62.83m. I.K. Rádio Progresso. Sao Paulo, Brazilo.
Vendredo	00.45-01.00	San José. Kiel marde.
	17.30-17.35	Bern. Kiel lunde. P. (D-ro Privat.)
	17.55-18.10	Roma. Kiel marde.
	21.30-21.45	Guatemala Cd. 470m, 197m, 47m, 30.50m. I. Radio-Esperanto, La Voz de Guatemala, Mez-Ameriko.
Sabato	18.30—19.00	Rio de Janeiro. 375m, 30.70m, 25.10m, 16.80m. K.I. Rádio Ministério da Educação, Praça da República 141A, Rio de Janeiro (D.F.), Brazilo.
	21.00-21.30	Rio de Janeiro, 375m, 25.10m. K.I. Rádio Ministério da Educação, Praça da República 141A, Rio de Janeiro (D.F.), Brazilo.
	21.00—21.30	Rio de Janeiro, 214m. K. Radio Roquete Pinto PRDS, Rio de Janeiro, Brazilo.
	22.15-22.22	Hilversum, 298m, 188m. P. K.R.O., Emmastraat 52, Hilversum, Nederlando.

Radio Roma. 2-VI, Tra la literaturo; 5-VI, Julio; 9-VII, La urbo Varese; 12-VII, Leterkesto kaj bibliografio; 16-VII, Novajoj el Italujo; 19-VII, Itala Nobelpremiito Grazia Deledda; 23-VII, Itala turisma regiono Kampanio; 26-VII, Somero; 30-VII, Sur lago Maggiore; — Krome, ĉiun merkredon, Kuriero de Esperanto — Prelegantoj: D-ro Vincenzo Musella kaj S-ro Luigi Minnaja.

Radio Sofia. Ni ĝoje salutas la reaparon de la bulgara radio en nia rubriko. La programo enhavas temojn de kultura, socia, ekonomia, politika, muzika karaktero kaj ankaŭ diversajn esperantajn temojn. Ne forgesu danke skribi al la gvidantoj de Radio Sofia, kaj esprimi viajn impresojn kaj sugestojn.

Redakcia noto

Pro la kreskanta diversflanka aktiveco de UEA, ni devas severe limigi la spacon dediĉeban al beletro en nia revuo. Tre amasiĝis en la redakcio jam akceptitaj manuskriptoj, kiujn ni aperigos iom post iom; ni petas indulgon kaj komprenemon de la respektivaj verkintoj! Kaj ni atentigas la legantojn, ke provizore ni ne povas akcepti pluajn beletrajn manuskriptojn.

Novaj Libroj

Duope ricevitajn verkojn ni recenzas; unuope ricevitajn ni nur mencias.
*) ricevebla ĉe U.E.A.

GORENJSKO DUM PACO, SU-FERO, LUKTO KAJ LIBERO*. Kolektis, redaktis kaj verkis Slavko Smolej. (Ljubljana) 1955. Eld. Slovenia Esperanto-Ligo, p. VIII-146-2. (Albumo de dokumenta bildaro kun literaturaj fragmentoj). 25.5 x 21.5 cm. Tole bindita 900 dinaroj aŭ 3 dolaroj (45 steloj); lede bindita 2.500 dinaroj (125 steloj).

Gorenjsko — la „Montejo” dominata de la impona Triglav (Trikapulo), brilanta per akva okulo de la ĉarma Bled, kadrita per verdo de kampoj kaj montaj herbejoj — estas slovena koino tranĉiganta inter Aŭstrujon kaj Italujon. Tiu situo sur kontakta linio de tri nacioj kaj tri kulturoj donis al ĝi specifan folkloran aspekton, en kiu intime kunfandiĝas elementoj ŝajne heterogenaj kaj tamen konsistigantaj bildon frapan per sia harmonio kaj originaleco. La sama situo tamen faris tiun distrikton unu el tiuj geopolitikaj nodoj kies historio estas skribata per sango kaj ĉapitrata per kataklismoj. Des pli frapas en la albumo la kontrasto de la viviga belo de paco kaj de la krudo de la frakasa pugno de milito, la kontrasto, kiun arte kaptis Slavko Smolej per okulo de la fotografilo.

Certe, ĉiu kaj ĉia milito estas teruro, eĉ teruroj tamen varias laŭ sia intenco kaj morala aspekto. Lastaj jarcentoj normigis tipon de milito interŝtata, kiu premias privatrajtan egalecon de la nacio atakanta kaj atakata. Aĝoj kontraŭ tiu koncepto estis konsiderataj krimoj — eĉ de la farintoj, kiuj penadis aŭ nei ilin, aŭ pravigadi per neceso. La milito kiun ni travivis diferencis, ĉar ties iniciatintoj premias absolutan senrajtecon de la atakato, ĉar la milito gvidata de ili estis direktata ne kontraŭ ŝtata povo, sed kontraŭ homoj. Ĝi estis socieksterma milito kies similon oni devas serĉi en primitivaj stadioj ĝisnun konsiderataj kiel estinteco nereturnebla.

Reproduktoj de oficialaj dokumentoj (des pli teruraj en sia senemocia objektiveco) alterne kun inkubaj bildoj de ekzekutoj, apokalipsaj vizioj de kadavrolavangoj en koncentroj alterne kun senhonta, organizita rabo en pacaj vilaĝoj — ĉio ĉi konsistigas imagon des pli teruran, ke ĝi ne estas ilustrado de izolita, akcidenta homa frenezo, de senbridita homa pasio, ke ĝi ne estas imago de krimo. Ĝi estas io alia, io pli minaca: bilda skemo de nova, malhoma sistemo bazita ne sur rajto al vivo, sed sur rajto

al mortigo, konceptanta vivon mem kiel funkcion de mortigado. Ĉu ne estas ja frapa la fakto, ke la plej teruraj bildoj en tiu albumo devenas el arkivoj de la administro kaj armeo, ke ili estis farataj de oficialaj fotoreportistoj, de oficistoj komisiitaj eternigi tiun abomenon por gloro de la sistemo, kiun ili servis? Kiaj ajn estis aŭ estas krimoj de aliaj reĝimoj, ili ĉiam — almenaŭ subkonscie — estas konceptataj eĉ de la ekzekutistoj kiel faroj esceptaj, krimaj, sekretaj. Por mi tiuj fotoj estas morale pli senesperigaj ol eĉ la faroj, kiujn ili reprezentas. Ili estas proklamo de nova, malhoma moralo. Ni frontas socisistemon, kiu dokumentadis farojn konsiderataj krimaj de la tuta homaro, sed konceptataj de la reĝimo mem kiel normalaj kaj memorigindaj funkcioj de la sistemo.

La tria parto — la partizana milito — estas nur natura historia ĉenero, natura reago de la homa etoso. Kondiĉoj de partizana milito ne favoris dokumentadon kaj multaj fotoj ilustras tiun popolan ribelon de la flanko de invadintoj, ilustras ilian vanan penon estingi la flamon de libero. Estas tamen en la albumo ankaŭ fotoj faritaj de la partizanoj mem, iuj el ili frapaj per sia patoso, per la emocia ŝarĝo de koncentrita, koscia lukta volo de liberaj homoj.

Unu elementon necesas menci, en la tekstoj ne mankas akcentoj de venĝa triumfo. Akcentoj naturaj ĉe la suferintoj, sed bedaŭrindaj el la vidpunkto de ilia lukto por libero, la lukto celanta ne detruon, sed defendon de vivo. Morto aŭ sufero de malamiko de l'libero ne estas spektaklo. Estas bone, ke la solaj bildoj prezentantaj vicon da mortigitaj invadintoj ne estas aktoj de triumfo, sed dokumentoj faritaj de la invadintoj mem. El la solaj du fotoj prezentantaj venkitan invadinton almenaŭ unu impresas per sia homa aspekto, per la senespera laco kaj seniluziigo. Kaj tamen — ĝuste en kunteksto de triumfa libero — ĝi sonas kvazaŭ falsa agordo. Elokvento de senvivaj aĝoj (p. 94—95) eble estus same forta.

La bilanco de liberiĝo enhavas momentojn vere kortuŝajn: reveno de vivantaj kadavroj el koncentroj, aŭ reveno de mortintoj vivontaj en memoro de la popolo. Solenoj, amasaj demonstroj — ĉio ĉi havas signifon nur en kunteksto de aliaj faktoj. Post jaroj da totalismo ni lernis iom malfidi tiujn formojn de sociaj aktivecoj. Sed la vizaĝoj de homoj reve-

nantaj el Dachau kaj Mauthausen havas sian propran, aŭtentan elokventon.

La finaj fotoj nur tuŝas randon de postmilita historio. Eble des pli bone, ĉar en tiu periodo selekto de ilustraĵoj estus jam pli subjektiva ol dokumenta.

La fotoj pri persekutoj kaj lukto, farataj aŭ por oficialaj instancoj aŭ en kondiĉoj de „subterejo”, emfazigas objektivan kaj parolas per sia dokumenta valoro, per patoso de faktoj. En ĉapitroj tamen pri paco kaj rekonstruo, sed ankaŭ en historio de partizana milito estas multaj fotoj (precipe de Slavko Smolej) frapantaj per sia arta valoro, per la kapablo kapti esencon de la belo de naturo kaj etoson de la homo kaj socio. Ekz. la foto prezentanta laboron en uzino impresas kvazaŭ bona pentraĵo de franca impresisma skolo.

La reproduktoj certe estas unu el plej bonaj atingoj de jugoslava libra grafiko, kvankam kritikeblaj el teknika vidpunkto. Plaĉe impresas la kolora tolbando, laŭ sia aranĝo iom rememoriganta bonajn rusajn modelojn. En la arta vidpunkto do la albumo estas bona donaco. Ĉu laŭ sia enhavo?

Estas debatinda demando, kion ni deziras havi en nia literaturo. Certe, se la devizo de humanisto estas: „Nenion homan mi konsideras fremda por mi”, Esperantisto povas aldoni: „... kaj nenio koncernanta liberon estas indiferenta al mi”. Esperanto mem estas ja liberiga faktoro de la socia vivo kaj estas konceptebla nur en kunteksto de libero. Ĉu ni tamen emfazu pri la negativa aspekto de la historio de libero, pri ties tragedio, aŭ ĉu pri ties pozitiva, krea, estonteca aspekto? Tiuj el ni, kiuj per sia vivo aŭ intima kono spertis teruron de la regno egaliganta liberon kun rajto al sklavigo kaj vivon kun rajto al mortigo — tiuj el ni (mi ripetis) ofte staras senhelpaj kaj senesperaj antaŭ la nekomprene de vastaj amasoj, de tutaj nacioj kiuj nek emocio nek intelekto povas koncepti tiun gigantan teruron, kiuj ne kredas pri ties realo, aŭ komforte preferas ignori ĝin, ŝvebante en kredo pri nepro, neeviteblo de progreso al homaranismaj idealoj. Ĉu do ne estas nia devo dokumenti la veron por ne nur armi kontraŭ sugestaj voĉoj de oportunismo, sed ankaŭ stimuli al aktiva kontraŭstaro al ĝi, al tiu koscia lukta sinteno, kiu estas esenca kondiĉo por realigo de homa progreso? Aŭ ĉu ni emfazu nur pri pozitivaj faktoroj, arman-te nur per belo de l'idealo, aktivigante nur por krea pensado? Ĉu ni ne lasu fali vualon de forgeso por ne mortigi homan idealismon per miasmoj de malamo kaj malfido? Ĉu tamen idealismo rifuzanta fronti realon ne estas nur egoisma malkuraĝo? Mia opinio estas, ke dokumentado necesas — kiel protesto, kiel averto, kiel sobriĝo, kiel provilo de idealismo. Ĝi necesas al ni kiel Esperantistoj kaj ĝi bezonas Esperanton kiel portilon.

Kaj fine — lasta kritiko el Esperantista vidpunkto. Multaj geografiaj nomoj estas „mortaj” por neslava leganto, samkiel la nomoj de citataj slovenaj poetoj

kaj verkistoj. Iu pli detala mapo de la regiono, kelkaj faktoj historiaj, kelkaj biografiaj informoj — sume ne pli ol 2—3 paĝoj — vivigis la libron, farus ĝin multe pli komprenebla por internacia leganto. Citoj, faktoj, nomoj neniam havos saman emocian ŝargon por alinaciano; se tamen oni destinas libron por li, oni devas memori pri tiu fakto, oni devas faciligi al li almenaŭ intelektan aliron al la temo.

M. Wajsbium

VAGADO SUB PALMOJ* de Jean Ribillard. Eld. UEA, 1956. 56 p. 14 x 21. Prezo 2.50 gld. (10 steloj).

Ni, legantoj de la revuo Esperanto, rememoras, ke ekde julio 1955 ĝis aprilo 1956 ni kun plezuro legadis serion de amuze kaj belstile skribitaj felietonoj de Jean Ribillard: „Vagado sub palmoj”. Absorbis nin bunta priskribo de la Okcidenta Saharo, per la plumo de franca oficiro, kiu sciis antaŭ niaj okuloj elsorti la sunardajn senlimajn sablaĵojn, la sufokan atmosferon de mortige soifaj senakvejoj, la malgrandajn paradizojn de la indiĝenaj oazoj, la morojn de la nomadoj, la socian staton de la peze laborantaj virinoj ĉe flanko de la viroj, senaĝe revantaj en dolĉa nenifarado, sed ankaŭ tiun de la paciencaj kaj maldanke traktataj ŝarĝbestoj: kameloj kaj azenoj, la fidelaj helpantoj de la homo. Jen la mondo, kiun travivas soldato de franca garnizono, observante ĝin per eŭropaj okuloj, kiuj kun pentrista sentivo unike perceptas la ĉiam ŝanĝiĝantajn kolorojn de la senlimaj saharaj dunoj.

Naŭ ravaj rakontetoj, originale verkita en riĉa, flua Esperanto, formas nun unu broŝuritan volumon sur luksa kreta papero kun 20 fotografioj, kiuj alproksimigas al ni la ekzontan sorĉon de Saharo. La libro estas la unua eldonaĵo de la Eldona Fako de UEA laŭ la Baza Laborprogramo (III, 4, k). *Pumpr*

LA FINGRO DE LA DIABLO* de Nils Christensen. Eld. Esp. AIS, Oslo, 1957. 29 p. 13 x 18. Prezo: 2.50 kr. aŭ 5 steloj.

Jen originala rakonto, verkita en 1953 kaj nun eldonita tri jarojn post la morto de la verkinto. Tiu, eksciinte pri la pereiga potenco de fingroforma votajo prenita el la ruinoj de la katedralo de Hamar, havis la bonan ideon, skribi rakonton, kiu klarigus la cirkonstancojn el kiuj tiu potenco devenas. La rezulto estas tre plaĉa libreto, kiu tenas vigla la intereson per kortuŝaj kaj eĉ memorindaj scenoj.

Ne malgrandan parton en la plezuro de la leganto havas la bonega lingvaĵo kaj stilo. Pro tio, kvankam multe pli ol nura legolibro, la verketo tre taŭgas kiel gvidilo en la rakontan stilon. Por adapti ĝin al komencantoj, oni saĝe aldonis liston de 25 vortoj ne troviĝantaj en la norvega ŝlosilo, kun klarigo en Esperanto kaj norvege. Kun siaj plaĉaj preslitteroj kaj bona papero (unu preseraro je p. 11/10) la libreto certe plaĉos.

D. B. G.

NIA FORUMO

Estontaj Reagoj kontraŭ Esperanto

La ekzemploj de filistra obstino sub rubriko La Lingva Haoso (Esperanto, N^o 618-5) demonstros denove la malfacilon konvinki, malgraŭ konstanta pruvado en kongresoj, literaturo kaj familiaj rondoj, ke la internacia lingvo ne nur estas ebla, sed fakte jam funkcia.

Konstatinte do, kiom la mondo emis, kaj daŭre emas, imponigi antaŭ la ŝablonaĵoj teorioj de eminentaj ĉarlatanoj, ignorante la pruvojn pri ties malpravo, ni rajtas scivoli, kiom longe la lukto daŭros en la estonteco kontraŭ argumentoj, kiaj

*La krea efiko de Eŭropaj lingvoj
Povas demonstri sin per tio, ke la
vibroj
Kiujn produktas la parolo de tiuj
lingvoj
— Ĉiu senescepte — havas direkton.
Mi ne trovas iun vibran direkton en
Esperanto.
— Impulso sendirekta estas haoso.*

ĉar tia estas la kritiko en lastatempa angla poemego* — oni akuzas nin pri haoso, kaj kvankam ni malagnoskas la akuzon, kiel en tiu ĉi kazo refuti ĝin konvinkite antaŭ la mondo? Kiel pruvi, ke Esperanto havas, vibran direkton? —

La aŭtoro de la supra cito estas egoista, aroganta kaj provokema, sed lia kontribuo al la angla literaturo estas rimarkinda — tiom, ke li povas bani sin en la laŭdoj de homoj, kiaj T. S. Eliot, kaj la koncerna poemo ricevis seriozan kaj ĝenerale aproban taksadon en gravaj internaciaj gazetoj. Cetere, MacDiarmid ne estas triviala filologo kiu provas pruvi propran lertecon, sed dediĉita poeto, kiu konstatas la neceson de mondlingvo kaj mondkulturo. En *In Memoriam* li eĉ parte batalas por ni, ĉar li ridindigas la parohan sintenon de tiuj, kiuj kredas, ke sole la Granda Kvin faras lingvan kontribuon al la mondkulturo, kaj frapas la fingrojn de la homoj, kiuj subtenis Basic English ignorante la atingojn de Esperanto dum sesdek jaroj.

En aliaj rilatoj MacDiarmid provas eĉ pli konvinkite almenaŭ por mi) sian esencan simpatian al Esperanto kaj la manieron en kiu ĝi konstruiĝis, sed la manko de „vibra direkto” en la lingvo faras el li malamikon!

Estus tre facile forrikani tian demandon, sed ĝi fakte estas por ni signifa; ĉar ĝuste tiaj demandoj frontos nin ĉiam pli ofte en la estonteco sub la duobla impeto, ke ju pli moderna literaturo son-dos la altojn de homa kompreno, des pli abstraktaj fariĝos la problemoj stariĝitaj; kaj samtempe ju pli Esperanto venkos konkretajn kritikojn, des pli amase leviĝos kritikoj malkonkretaj konforme kun la ĉiamaj karakterizoj de cedanta kritikemo.

Kiel ni povos rezisti tiajn tendencojn? Tio dependos de la individuaj atakoj;

sed dume ni povus almenaŭ certigi, ke inteligentaj homoj, kiuj objektivite ekstudas nian lingvon ricevos iun gvidon en nian literaturon, anstataŭ la kutiman senklasifikitajn listojn de ofte tedegaj fuŝaĵoj, kiuj garnas la kovrilojn de niaj lernolibroj.

Ekzemple, mi estas certa, ke MacDiarmid neniam legis Kaloscaj'on.

J. Francis

* *In Memoriam James Joyce de Hugh MacDiarmid.*

Traduka Servo per Telefono

El nederlanda gazeto („Leeuwarder Courant” de 22/V/1957) mi tradukas jenan, laŭ mi tre interesan, informon:

„Butikistoj en Vieno povas, havante malfacilaĵojn lingvajn dum vizito de alilingvaj turistoj, telefone peti helpon de tradukisto. Post kiam la eksterlanda kliento ripetas sian mendon antaŭ la telefono, la tradukisto povas sciigi la butikiston, kion la kliento deziras.

Tiu ideo speciale taŭgas por helpemaj geesperantistoj, kiuj povas facile elembarasigi ne-esperantistan butikiston aŭ hotelestron kaj Esperanton parolantan turist(in)on.

Tiel la tradukpreta esperantist(in)o montrus al la butikisto aŭ hotelestro la grandan valoron de la Esperanto-socio kaj donus gravan servon al samidean(in)o helpobezona.

Sed kiel kontaktigi tradukpretul(in)on kaj tradukbezontan(in)on?

Leginte ĉi-supran informon, mi tuj turnis min al la telefonadministracio de nia regiono kun la demando, ĉu mia telefona numero estus mencienda en la telefonnumeraro ankaŭ ĉe la vorto „Esperanto”. Mi ricevis la ĝojigan respondon, ke tia mencio estas ne nur ebla, sed ankaŭ rekomendinda, sed ke mi sendu skriban peton tiurilatan al la telefonadministracio.

Se ne nur ĉiu delegit(in)o de U.E.A., sed ĉiu telefonhava, lingve kapabla kaj tradukopreta esperantist(in)o sendus similan peton al la telefonadministracio, en la telefonlibroj estus sub la vorto „Esperanto” tuj troveblaj la adresoj de tradukopovaj kaj -pretaj gesamideanoj, al kiuj tradukbezona vojaĝanta samidean(in)o telefone povas turni sin.

Tia mencio en telefonlibro estus ĉiutaga propagando kaj reklamo por Esperanto.

Sendante al ĉiu butikisto kaj hotelestro cirkuleron atentigantan pri tia eblo de tradukohelpo, oni montrus al ili la valoron kaj utilon de Esperanto kaj eble varbus ilin por skriba aŭ parola Esperanto-kurso.

Tjerkwerd (Fr.), majo 1957.

Nederlando.

Telefono: 0 5157-726

S. S. DE JONG Dzn.,
delegito de U.E.A.,

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

EENDRACHTSWEG 7 ROTTERDAM C. NEDERLANDO

OFICIALA INFORMILO

La 1-an de junio 1957

N-ro 295

STATISTIKO. Jen la stato de la membraro je la fino de majo kaj ankaŭ por komparo, je la fino de majo 1956:

	1956	1957
Asociaj membroj	8272	9691
Individuaj membroj		
MJ	784	708
MA	3966	5052
MS	677	634
Pat.	9	5
DM	289	301
HM	54	52
JMJ	—	12
JMA	—	85
	5779	6849
	14051	16540

Aŭstralio

Moe (Victoria). D: S-ro Ivan Theodore Maddern, instruisto, High School.
Wynnum Nrth (Queensland). FD (Katolikismo): Pastro Sigismondo O.F.M. Cap., monakpastro, 545 Tingal Road.
Nowra (New South Wales). D: vakas.
Plumpton (New South Wales). FD (Katolikismo): vakas.

Belgujo

Herseaux (Fl. Occ.). D: S-ro Léon Paelman, kontregistristo, 44 rue Louis Bonte.
Liege FD (Turismo): S-ro René Mathieu-Plumhans, pensiulo, 13, Voisinage André Dumont, Ougree.
St. Nicolaas. D: vakas.

Brazilo

Fortaleza (Ceará). D: vakas.
 FD (religio: adv.): vakas.
Niterói FD (bankaj aferoj): vakas.

Britujo

Addlestone (Surrey). FD (Katolikismo): S-ro Norman W. Vigar, emerito, 28 Franklands Drive.
Johnstone (Renfrewshire). FD (Literaturo): S-ro William Auld, instruisto, Knockfarril, Thornsidge Road.
Thames Ditton (Surrey). D: James Lloyd Ford, aĉetisto, 14 Linden Close.
Watford (Herts). D: S-ro Herbert William Allen Smith, ŝtatoficisto, pensita, 89 Cassiobury Park Avenue.

Bulgario

Kazanlik. D: S-ro Todor Jevlev, kontisto, Strato M. Ĉernev 11.
Kolarovgrad. FD (instruado): S-ino Parina Kasabova, eksinstruistino, str. Kiril r. Metodi 70.

Ĉeĥoslovakio

Debr (Cechy). D: S-ro Frantisek Simánek, laboristo, 27-poŝta Josefuv Dul.
Gottwaldov-Zlín (Morava). D: F-ino Jirina Honsová, oficistino, Lazy IV. 3665.
Karviná 2-Doly. D: S-ro Odehnal Antonin, mineja teknikisto, Nro. 1604.
Náchod (Cechy). D: S-ro Josed Bures, instruisto/vicdirektoro, Dolní Radechova c. 101.
Poprad (Slovensko). D: S-ro Milan Zvara, inĝeniero de nutrajkemio, Leninovo n. 62.

Danlando

Faaborg (Fyn). D: S-ino Ellen Møller, instruistino, Diernæs a/M.

Finnlando

Helsinki-Centro (Uudenmaan lääni). VD: S-ro Jarkko Laine, librovendisto, Niskonk 20.
 FD (librokomercio): la VD (Centro).
 VD (Kallio): vakas.
 VD (Lauttasaari): S-ro Simo Raumavirta, sekiestro, Pajalahdentie 25.
 FD (Hollerith-maŝinoj): la VD (Lauttasaari)
Helsinki. FD (instruado): vakas.

Franco

Cheesy (S. et M.). FD (Abelkulturo): S-ro André Tribouillard, kontrolisto, Cheesy par Montevrain.
Coulommiers (S. et M.). D: S-ro Maurice Sujet, instruisto, Cours Complémentaire.
Foix (Ariege). D: S-ro André Rebeyrol, eks. P.T.T.-inspektoro, 49 rue du Chapeliers.

LA INTERNACIAJ KONKURSOJ 1957

Stato je la 31-a de majo 1957

14.	Germanujo	6515	4510	69.22
15.	Norvegujo	2113	1395	66.02

Konkurso II

Konkurso I					Konkurso II				
	Lando	Kvoto	Poentoj	%	Lando	Kvoto	Poentoj	%	
1.	Usono	2016	2590	128.47	1.	Aŭstralio	1025	1128	110.04
2.	Nederlando	4894	5327	108.84	2.	Aŭstrujo	1400	1385	98.93
3.	Jugoslavio	3563	3645	102.30	3.	Sudafriko	230	215	93.48
4.	Italujo	3620	3675	101.51	4.	Argentino	745	675	90.60
5.	Finnlando	2687	2645	98.44	5.	Portugalujo	580	520	89.55
6.	Hispanujo	2092	2015	96.32	6.	Novzelando	942	800	84.93
7.	Franco	6575	6320	96.12	7.	Urugvajo	325	270	83.08
8.	Danlando	1910	1820	95.29	8.	Kanado	500	410	82.—
9.	Svislando	1910	1760	92.15	9.	Japanujo	1210	975	80.85
10.	Belgujo	1952	1776	90.98	10.	Izraelo	290	220	75.86
11.	Britujo	7351	6534	88.89	11.	Islando	405	235	58.02
12.	Svedujo	6895	6565	85.21	12.	Maroko	1061	450	42.41
13.	Brazilo	6985	5181	74.17	N.B.	Je nia plezuro Argentino esprimis la deziron denove partopreni la Konkurson.			

L'Hay-les-Roses (Seine). D: S-ro Paul Tournon, inĝeniero, Cité des Castors D 1.

Mulhouse (Haut-Rhin). VD: S-ro Marcel Cuené, librotenisto, 110 rue d'Illzach.

Germanujo

Heide (Dithmarschen). D: vakas.

Neustadt (Holstein). D: S-ro Berthold Fischer, akordion-instr., Kreienredder 33.

Hispanujo

Madrid. VD: S-ro Manuel Martín Gómez, poŝtisto, Francisco Silvela 60.

Hungarujo

Györszentmárton (Györ-Sopron vm). D: S-ro Dániel Zánkai, librotenisto, Szabadság 15.

Italujo

Bologna. FD (fervojoj): S-ro Germano Gimelli, fervoja ĉefeletektrikisto, Via Donato Creti No. 61.

FD (Kemio): D-ro Luigi Tadolini, Via Porrettana No. 137.

Carbonia (Sardinio). FD (Poezio): S-ro Gavino Nurra, oficisto, Via Oristano 14.

Torino. FD (privata instruado): S-ro Salvatore Panvini, lernejestro, Via Garibaldi 37.

Jugoslavio

Rijeka (Hrvatska). VD: vakas.

Maroko

Meknes. FD (komerco): S-ro Jean Ronda, komercagento, Rue des Pervenches 78.

Nederlando

Arnhem. FD (literaturo): S-ro Hendrik Groendijk, prof. en nederlanda lingvo, Pontanuslaan 7.

Bussum. FD (flegado): vakas.

Marken. D: S-ro Jaap Visser, ĉef-sipestro, Havenbuurt 7E.

Svedujo

Korsnäs (Dalarna). D: S-ro Emanuel Kull, pedelo, Box 2122.

Tumba. D: Esbjörn Stridell ne funkcias ĝis aprilo 1958 pro foresto.

Svislando

Ascona (Tessin): D: S-ro Pierre Métié, ĝardenisto, via Ferrera, FD (turismo): la D.

NOVA KOMITATANO

Parker, S-ro Fred, 368 Colne Road, Burnley, Lancs., Britujo.

La Konsilantaro de BEA elektis S-ron Parker por anstataŭi S-ron A. C. Oliver, kiu devis eksiĝi pro hejmaj kaj profesiaj cirkonstancoj.

GRAVA ATENTIGO

La Centra Oficejo ne povos respondi al leteroj inter la 27-a de julio kaj la 17-a de aŭgusto ven. Ni tre insiste petas al ĉiuj ne skribi al la oficejo en tiu periodo. Ni antaŭdankas pro via kunlaboro.

DONACOJ

AL LA GENERALA KASO:

W. H. King 8.69 gld; C. Nyanasatta 2.50 gld; Londona Klubo 53.25 gld; R. Barta 4.67 gld; N.N. 10.86 gld; R. Sparks 1.90 gld; E. M. Maasbommel 3.20 gld.

Al ĉiuj donacintoj koran dankon.

M. H. VERMAAS
Direktorino C.O.

ANONCETOJ

Londona Gastejo, agrabla loĝloko. Lito kaj matenmanĝo po 14 s 6 p por ĉiu nokto. Prezoj malaltigas laŭ loĝdaŭro. Oni parolas Esperanton kaj la francan. A. Bytheway, „Flat Four”, 1 Warrington Crescent, LONDON W. 9. Anglujo, Telefono CUNningham 4487.

Koresponda Servo Mondskala. Nuntempe, multaj adresoj haveblaj el Britujo, Estonio, Francujo, Pollando, Japanujo, Bulgarujo, Finnlando. Skribu, indikante **viajn** sekson, aĝon, profesion, al: Daniel LUEZ (adreso sur paĝo 121) kaj enmetu unu respondkuponon por ĉiu petata korespondanto.

La nova Kristaneco, bazita je la doktrino de sveda sciencisto kaj reformanto Em. Swedenborg, enportas certan lumon en la homan animon pri la postmorta vivo kaj pri vera religio bazita je la Biblio kaj ĝia interna senco. Ĝi akordigas la religion kun la scienco. Postulu traktatojn senpage. Aldonu, se eble, resp. kuponon. Adreso: Jan B. Vlach, Luzjicka 21, Praha XII, Ĉeĥoslovakio.

Baldaŭ, Libervola Internacia Civila Servo starigos multnombrajn laborkampojn. Miloj da gejunuloj partoprenos. Esperantista ĉeesto utilos por propagandi esperanton. S.C.V.I., 77 Jean Jaurès, Clichy (Seine), Francio.

Interŝanĝas poŝtmarkojn, bildkartojn, Guido Schaeckers, O.L.H. Beestjeslaan 26, BOSVOORDE, Belgujo.

Poŝtisto Piduch Józef Ochla, pow, Zielona Góra, Pollando, deziras korespondi, interŝanĝi poŝtmarkojn, poŝtkartojn. Certe respondoj.

Deziras korespondi kun tutmondo, interŝanĝi poŝtkartojn kaj leterojn. Kubrnsky Miloslav, Hukvaldská 548, Frydlant-Ostr., Ĉeĥoslovakio.

37-jara instruisto, deziras korespondi kun tutmondaj fraŭlinoj. Filograna, via Massarenti 5-12, Genova-Sestri, Italujo.

Itala oficisto deziras korespondi kaj interŝanĝi ilustritajn poŝtkartojn kun la tuta mondo. Librotenisto Anteo Caprio, via Pianeza 63, Torino, Italujo.

Legu la reklaman en la jarlibro 1957 p. 283 kaj agu!

Filatelistoj! Mi deziras interŝanĝi pm kun la tuta mondo. Mi principe kolektas pm kiuj montras bestojn, birdojn, fiŝojn, insektojn, florojn, fruktojn, sportojn. Respondoj ĉiujn. Adreso: Prof. M. F. Wales, Al. Slowackiego 60/2, Kraków, Pollujo.

Fine de decembro okazos grandskala letervespero. Partoprenos ĉ 200 pers. diversaj, diversprofesiaj. Amase sendu leterojn, poŝtkartojn, esp. aĵojn al: Esperanto-Asocio, str. Dubois 3, Wrocław, Pollando.

20-jara bibliotekistino, Colleen Berry, Box 16, Havelock North, Hawke's Bay, Novzelando, deziras korespondi kun tutmondo. Interesiĝas pri libroj, poŝtkartoj, ktp.

Pri stenografio deziras korespondi kun la tuta mondo Todor Ivanov, str. Kiril i Metodi 145, Sofia, Bulgario.

S-ino E. v. d. Horst-Visser, v. d. Schellingstraat 6a, Rotterdam, Nederlando, deziras korespondi kun ĉiuj landoj.

Deziras korespondi kaj interŝanĝi il. pk. tutmonde, nepre respondoj, Christian Becher, Dresden A 28, Rabenauer Str. 28, Germanujo DDR.

Kontraŭ 250 p.m. uzitaj (ĝis dek samaj) de via lando sendos egalkvanton de Aŭstralio, Nov-Zelando, k.t.p. W. Illingworth, 25 Barnfield-rd., Claremont, (W.A.) Aŭstralio.

S-ro Juan Reguant, Rambla 99, Sabadell, Hispanio, serioze interŝanĝas poŝtmarkojn tutmonde, kvanton kontraŭ kvanto, tuja respondo.

Petas kontakton kun ĉiuj, kiuj tradukis en siajn nac. lingvojn la japanajn E-aĵojn pri Hiroŝimo „Infanoj de l'Atombombo”, „Kun la kadravro del'edzino” k.a. (pri la 6-a aŭg. 1945 mat. 8.15). Adolfo Moš, per Schloz, (14a) Aichschiess, Esslingen a.N., Germanujo.

Turistoj, kiuj intencas viziti Islandon, bonvolu antaŭe skribi al M. Johnsson, Box 786, Reykjavik, Islando.

En Anglujo aŭ Francujo mi serĉas por mia filino dum monato aŭgusto 1957 familieran gastigadon kontraŭ reciproka gastigado en Bonn — tempo laŭ via deziro escepte aŭguston. Mia filino, lernantino, deksepjara, ne parolas Esperanton, sed deziras pligrandigi la konojn en franca aŭ angla lingvo. Detala propono al bankprokuristo Josef Suermann, Muensterplatz 1, Bonn, ĉe rejno, UEA-fakdelegito.

Ĉu vi serĉas esperanto-libron elĉerpitan, eble mi havas aŭ havos por vi. Petu mian libro-liston. Mi havas stokon de la jenaj libroj, kiujn mi vendas al revendistoj kun 20 % da rabato, Baghy: Argenta Duopo, dua volumo 2,50; Sur Sanga Tero 4,50; La Teatra Korbo 1,50; La verda Koro 1,95; Szilagy: Ellernu 2,00; Földes: La Strato de la Fiŝanta Kato 4,50; Boudier-Bakker: Surprizoj 4,50 bindita, 3,50 broŝurita. Prezoj en ned. gld. Skribu al: H. Veenstra, Libro-Vendisto, J. M. Kemperstraat 28, AMSTERDAM, Nederlando.

Mieczyslaw Zgórzewski, mag. phil., literaturisto-jurnalisto, Wrocław 2, Skrytka 22, Pollando, deziras korespondi tutmonde, diversteme ankaŭ kun komencantaj jurnalistoj kaj romanverkistoj. Certe respondoj.

Kiu urbo deziras ĝemeligi pere de Esperanto kun ROMANS, Francujo, urbo industria (ŝufabrikoj ĉefe), ekirejo por ekskursoj al monto, urbestro tre favora. Ĉio devus esti en ordo por ĝemeligo dum la Ekspozicia Foiro de Septembro. Skribu al BONA STELO, 31, Rue Pêcherie, ROMANS, Drôme, Francujo.

La samideanoj en la tuta mondo, kiuj povas sendi ŝuon eĉ uzitan, tipe lokan de sia hejmlando al ŝumuzeo en ROMANS, povas sendi ĝin al BONA STELO, 31, Rue Pêcherie, ROMANS, Drôme, Francujo. En la muzeo oni mencias: Donaco de... pere de Esperanto.

Literaturo pri Kvakerismo havebla. Sendu du respondkuponojn al la Hon. Sek., Jessie Saunders, Kvakera Esperantista Societo, Sydney Lodge, Bath Road, VENTNOR, I.W., Anglujo.

Esperantista klubo en Olomouc aranĝos la 10.9.57 tradician letervesperon. Junaj Ĉeĥoslovakaj gesanoj atendas viajn salutojn, kiuj subtenos ilin en ilia poresperanta laboro. Ĉiu ricevos dankrespondon kun plej novaj glumarkoj kaj belaj pm-j. Bonvolu skribi al sekr-ino: Marie Kubáčová, Velká Bystrice 228, u Olomouce, Ĉeĥoslovakio.

SESLINGVAJ FLUGFOLIOJ

Nun estas la sezono de la Internaciaj Kongresoj
Mendu tuj ĉe UEA

la nica literatura revuo

sub ĉefredaktoreco de
Prof. G. Waringhien
kun kunlaborado de
la plej famaj verkistoj
aperas ĉiun duan monaton
32/40 paĝa - - posformato
jare fr. fr. 400.- aŭ egalvaloro

Ricevas la abonojn:
En Francujo: R. Fiquet, Poŝta
konto 2259-98 Marseille

Alilande: Ĉiuj Ĉefdelegitoj kaj
landaj Perantoj de UEA

PETU SENPAGAN SPECIMENON

Redakcio: 7. Av. Léon-Gourdauld
Choisy-le Roi (Seine) Francujo.
Administracio: 5. Bd. Stalingrad
Nice (A-M)

ANGLA ANTOLOGIO APERONTA I

Eldonos UEA
Antaŭmendu tuj

Bindaĵo por via Jarkolekto 1956

el bela verda tolo

Prezo 2.50 gld. 10 steloj

MENDU TUJ ĈE U.E.A.

Binditaj jarkolektoj

1952	3.- gld.
1953-1954-1955 po	6.- gld.
1956	8.- gld.

50 % da rabato por individuaj
membroj de la koncerna jaro

MENDU TUJ ĈE U.E.A.

MAJSTROVERKO DE LA MONDLITERATURO



Henrik Ibsen:
PEER GYNT

Drama poemo kun komentario
kaj tri norvegaj popolfabeloj.

El la norvega lingvo tradukis
E. A. Haugen

Prezo: bind. 8 gld., broŝ. 6,30 gld
afranko 0,40 gld.

Eldonis: ELDONA RONDO, boks 109,
Trondheim, Norvegujo.

Mendu ĉe UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO
Eendrachtsweg 7 - Rotterdam-C. - Nederlando

La Fingro de la Diabolo

Rakonto
de la malnova Hamar

Ĉarma novelo de la
mezepoko pri stana fingro
alportanta malfeliĉon.

Facila lingvaĵo. Kun listo
de vortoj ne troveblaj en
la „Slosilo” de Esperanto.

Prezo Norv. kr. 2,50

Mendebla ĉe UEA, aŭ
Eldonejo Esperanto,
Oslo, P.B. 942, Norvegujo

ĈIULANDAJ JURNALISTOJ

Ni deziras kontakti kun
jurnalistoj en ĉiuj landoj.
Bone pagata laboro. Uzataj:
Esperanto, angla, franca,
hispana, portugala lingvoj.
Respondu tuj.

INTERNATIONAL
NEWSPAPERS AGENCY

Rosaleda - Eacamp - ANDORRA
Hispanujo

GRAVA VERKO MEMORLIBRO DE LA TRIA ESPERANTISTA EŬKARISTIA MONDKUNVENO

Okazinta en la Kadro de la
XXXVIa INTERNACIA EŬKARISTIA KONGRESO
Kompilata de Pastro D-ro Johano Baptisto Kao O.F.M.

Formato 19x14 cm kun 215 paĝoj de teksto plus 75 ilustraĵoj;
presita sur bonkvalita papero. Bonega libro por ĉiuj biblio-
tekoj de esperantistaj asocioj kaj tre efika instrumento
por la propagando de nia lingvo precipe en la katolikaj
medioj. Prezo: 2 usonaj dolaroj aŭ 8 ned. guldenoj aŭ
150 braz. kruzeiroj plus afranko. Akirebla ĉe

LIBRO-SERVO de Espero Katolika
Frederikstraat 10, DORDRECHT,
Nederlando

BRAZILA ESPERANTO-LIGO
Praça da Republica no. 54 sob.
RIO DE JANEIRO, Brazilo

kaj ĉe U.E.A.

HOTELO „De Sparren”

Naarderstraat 70
Tel. 02953 - 3422
LAREN (NH)
Nederlando

Belega ĝardeno 11.000 m²
Varma kaj malvarma akvo
en ĉiuj ĉambroj

Esperanto parolata

VAGADO SUB PALMOJ

Jean Ribillard

★

Streĉe
interesaj vojaĝimpresoj

Prezo 2.50 gld. 10 steloj

MENDU ĈE U.E.A.

Presita en Nederlando ĉe Zwagers, Rotterdam